

# 1 LA PROBLEMOJ DE LA REALO, UNUA PARTO

## 1.1 Tio, kion la plejmulto ne scias

<sup>1</sup>Elstara sciencisto de nia tempo respondis la demandon, ĉu la homaro ankoraŭ sukcesis esplori unu procenton da la realo: “Ne, eĉ ne dekmilonon de unu procento.”

<sup>2</sup>Sekve eĉ ne miliononon! Por tia sciencisto oni sendispute havas respekton. Neniu pli imponas ol tiu, kiu komprenas la grandegan nescion de la homaro pri la vivo. Ĉar estas evidente al ĉiuj, kiuj jam profitis de tio, kion povas instrui teologio, filozofio kaj scienco, ke la tireblaj konkludoj estas nur hipotezoj (eŭfemismo por konjektoj kaj supozoj!). Aŭ kiel profesoro Whittaker esprimas la aferon: ”Ni scias, ke ekzistas io, kion ni nomas materio, sed ni ne scias kio ĝi estas; kaj ni scias, ke ĝi moviĝas, sed ne kial, kaj tio estas la sumo de nia tuta scio.” Tio estas korekta. La scienco ne povas respondi la demandojn *kio* kaj *kial*, kion komprenis jam Newton. Por sin liberigi de la pruvoj de tia tro ĝena nescio, modernaj filozofoj klopodas forigi ĉiujn realecajn konceptojn, nomante ĝuste ilin fikcioj!

<sup>3</sup>Abundas je aŭtoritatuloj pri teologio, filozofio kaj scienco, kiuj povas juĝi ĉion kaj certege esprimas sin pri tio, kion ili eĉ ne ekzamenis. Ili apriore scias, ke ”tio” ne povas esti vera, ĉar ĝi kontraŭas al tio, kion diras ilia papera papo, aŭ ”kontraŭas al la naturaj leĝoj”. Kvazaŭ ilia paperpapo estus solvinta al ili la problemojn de la ekzistado, estus doninta al ili mondrigardon, kiu klarigas la realon kaj solvas la bazajn problemojn de la sciado! Kvazaŭ la scienco povus decidi, kio ”kontraŭas al la naturaj leĝoj”, ja esplorinte eĉ ne unu procenton da ili!

<sup>4</sup>Gravas, ke ni ne limigu nin je la esplorita, ke ni ne forĵetu unu solan ideon tial, ĉar ĝi ŝajnas al ni fremda, neverŝajna aŭ neutila. Gravas, ke ni esploru ĉiun novan eblecon de scio. Ni scias tro malmulte por ke ni permesu al ni preterlasi eĉ la plej malgrandan esperon plivastigi nian scion. Ĉiu novaĵo ŝajnas al la plejmulto ĉe la unua rigardo neverŝajna. Kiuj opinias, ke ili posedas juĝokapablon, tiuj akceptas nur tion, kio akordas kun ilia pensosistemo. Tamen ili devus povi kompreni, ke se tiu estus tiel korekta, ili estus preskaŭ ĉiosciaj.

<sup>5</sup>La sciencistoj ŝajnas konstante forgesi, ke iliaj hipotezoj kaj teorioj restas nur dumtempaj. Ili flatas al si, ke ili estas liberaj de dogmismo, ke ili pensas libere kaj korekte. Sed la historio de la scienco ĉiam atestis kaj atestas la malon. Senekzamena forĵeto de la ŝajne neverŝajna, fremda kaj nekonata (al kio apartenis iam ĉiu revolucia ideo) ankoraŭ okazas tro ofte ĉe la scienca aŭtoritatularo. La neesploritan la sciencistoj nomas trompaĵo kaj la religiemuloj dio.

<sup>6</sup>Estas io ŝajne nebonigebla, neelradikigeble idiota en tio: en la rifuzo ekzameni.

<sup>7</sup>La vera serĉanto, vidinte la plenan malorientiĝon kaj intelektan senpovon de la homaro koncerne la problemojn de la ekzistado, ekzamenas ĉion, tute sendepende de la kategoria rifuzado fare de la regantaj aŭtoritatuloj kaj de la moko kaj malestimo fare de la eĥema publikopinio de ĉio, pri kio ĝi scias aŭ povas koncepti nenion.

<sup>8</sup>Estas ŝajne senespera tasko klarigi al la neadeptoj la tute nekonatan, precipe kiam tio ŝajnas fremda, neverŝajna kaj nereala.

<sup>9</sup>La homaro tiel longe jam estas nutrata per tiom da religiaj, filozofiaj, sciencaj kaj dum la lastaj jardekoj ankaŭ okultaj provoj klarigi la ekzistadon, ke la plejmulto da homoj rifuzas informiĝi pri la efektiva scio, kiam tiu estas prezentata. Ili kontentiĝas per la esplorado de la mondo videbla al ili. Ĝenerala dubo pri tio, ĉu ekzistas iu alia realeco, disvastiĝas ĉiam pli.

<sup>10</sup>Supozu tamen, ke ekzistas iu scio pri la realo, kiu ŝajnas al la erudiciuloj plejalta absurdaĵo! Supozu, ke la filozofo Kantio eraris, trodire asertante, ke ni neniam povos ion ekscii pri la interna realo de la naturo! Supozu, ke la hindaj riŝioj, egiptaj hierofantoj, gnostikaj teurgiistoj, la originalaj, aŭtentikaj rozkrucaĵoj ne estis tiaj mistagotoj, ĉarlatanoj kaj trompisto, kiaj penas fari ilin la erudiciuloj!

<sup>11</sup>Karakterizas la hodiaŭan erudicion la malestimo de ĉio, kion ni heredis de niaj patroj, kvazaŭ ĉiuj ĝisnunaj spertoj de la homaro estus senraciaj kaj nevivipovaj.

<sup>12</sup>La naturesplorado jam multe progresis en siaj limigitaj regionoj. Tamen nur la elektitaro pri tiuj sciencoj komencas suspekti, kiel malmulte la homaro scias pri la tutaĵo.

<sup>13</sup>Kion la palentologoj scias pri la aĝo de la homaro, ke plene evoluintaj homoj ekzistas sur nia planedo jam dum 21 milionoj da jaroj?

<sup>14</sup>Kion la geologoj scias pri la du duonsferaj kontinentoj, Lemurio kaj Atlantido, nuntempe kuŝantaj sur la fundoj de Pacifiko kaj Atlantiko, kaj kion la arkeologoj pri la civilizacioj de tiuj kontinentoj?

<sup>15</sup>Kion la arkeologoj scias pri kulturoj pli proksimaj laŭ aĝo al ni ol la menciitaj: pri la hinda kulturo antaŭ ĉirkaŭ 50 000 jaroj, pri la egipta antaŭ 40 000 jaroj, pri la perua antaŭ 15 000 jaroj aŭ eĉ pri la antikva helena antaŭ ĉirkaŭ 12 000 jaroj?

<sup>16</sup>Kion la erudiciuloj scias pri la diversaj sekretaj sciordenoj ekzistantaj en multaj landoj? Kion ili scias pri la ordeno fondita de Vjaso en Hindio antaŭ ĉirkaŭ 45 000 jaroj, pri tiu de Hermeso Trismegisto en Egipto antaŭ ĉirkaŭ 40 000 jaroj, pri tiu de la unua Zoroastro en Persio antaŭ ĉirkaŭ 30 000 jaroj aŭ pri tiu de Pitagoro antaŭ nur ĉirkaŭ 2700 jaroj?

<sup>17</sup>Kion la sciencistoj scias pri la ekzistado, pri la strukturo de la universo, pri aliaj specoj de materio kaj mondoj ol la fizikaj materio kaj mondo, pri la ekzisto de iu kvina naturregno?

<sup>18</sup>Kion tiuj grandegaj erudiciuloj scias eĉ pri tiu vivo, kiun la individuo daŭrigas vivi post kiam li forlasis sian eluzitan organismon?

<sup>19</sup>La eroj de la tiurilata scio, kiujn ili eble sukcesis ekscii, estas tiel distorditaj, ke ilin oni povas plej bone rigardi kiel krudan superstiĉon.

<sup>20</sup>La ideo, ke la scion oni necese devas sekretigi, signifas por okcidenta opinio ion preskaŭ ŝokan aŭ ĉiuokaze mallogan, kaj estas proksima la supozo, ke temas pri "spirita ĉarlatanaĵo".

<sup>21</sup>La hindoj, kontraŭe, rekte komprenas, ke tio estas necesa. Ili havas plurmiljaran sperton, ke oni ne "ĵetu perlojn", kaj ili ne faras tion.

<sup>22</sup>Kaj tion pri la simplaj rezonoj, ke preciza kompreno postulas tre grandajn antaŭkondiĉojn kaj ke ĉiu scio potencodona estas misuzata de ĉiuj, kiuj povas uzi la potencon propracele.

<sup>23</sup>Ekzistas en Hindio multaj specoj de jogistoj. Jogistoj de la plej alta speco ne estas konataj de aliaj ol apartaj iniciitoj. Tiuj jogistoj, kiuj konatiĝas al la okcidentuloj, ordinare apartenas al la Ramakriŝna Misio. Ili instruas la sankthjan kaj vedantan filozofiojn laŭ la recepto de Ramakriŝno. La plej altaj jogistoj estas iniciitoj kaj heredigas sian scion nur al malmultaj elektitaj disĉiploj rigorege ĵurigitaj je silentado. Ili rigardas ĉiujn okcidentulojn kiel barbarojn, opiniante, ke estas profanado de ilia scio malkaŝi iom da ĝi al tiuj nesciuloj, nesaniĝeblaj skeptikuloj, mokemaj kaj arogantaj superemuloj, scivolaĉuloj, kiuj misuzas la scion, kredinte, ke ili komprenas ĝin. Plue la okcidentuloj metas ĉiun sian scion en la servon de la barbareco kaj sub la disponon de banditoj.

<sup>24</sup>La sinteno de la hindo al la vivo estas la diametra malo de tiu de la okcidentulo. Dum por la okcidentulo la fizika mondo estas la sola ekzistanta, por la hindo la superfizika estado estas la esenca realaĵo. La pli altaj materiaj mondoj ja konsistigas la materian bazon de la fizika materio, kaj la kaŭzoj de la procesoj de la naturo estas troveblaj en tiuj pli altaj mondoj.

<sup>25</sup>La efektiva jogisto, sukcesinte en siaj eksperimentoj, jam disvolvis organojn, kiuj ĉe aliaj homoj estas ankoraŭ nedisvolvitaj sed organizotaj kaj vivigotaj en la estonteco, organoj ebligaj la esploradon de pli altaj molekularaj specoj, tuta serio da ĉiam pli altaj agregiĝaj statoj, malproksime preter la esploraj rimedoj de la nuklea fiziko.

<sup>26</sup>La okcidentuloj havas nenian suspekton pri tiuj rudimentoj, kaj iliaj grandegaj aŭtoritatuloj moke kaj malestime rifuzas la ideon pri tiaj ebloj. Ili nome posedas la mirindan kapablon juĝi tion, pri kio ili scias nenion.

<sup>27</sup>La hinda ekspliko pri la mondo mem estas multe supera al la okcidenta. Ĝi instruas la evoluadon, la antaŭekziston de la animo, la renaskiĝadon kaj la karmon aŭ la leĝon de semado kaj rikoltado. Ĝi asertas, ke ekzistas aliaj mondoj ol la fizika kaj prenas sur sin pruvi tion al seriozaj kaj sinceraj serĉantoj, kiuj akceptas submetiĝi al ĝiaj metodoj por disvolvi estantajn ĉe la homo rudimentojn de pli altaj specoj de objektiva konscio. Per tio ĝi refutas la neadon de agnostikuloj kaj skeptikuloj pri superfizika sciado, pri la laŭleĝeco de la ekzistado, pri la evoluado kaj tiel plu., kaj tiel ebenigas la vojon al la esoteriko.

<sup>28</sup>Kiel do okcidentuloj sciuj ion pri superfizikaj mondoj, kiam mankas al ili la kapablo konstati ilian ekziston? Ili konstatas faktojn en la fizika materio per la fizika sensado (objektiva fizika konscio). Por povi konstati faktojn en pli altaj mondoj, necesas la responda speco de sensado. Tiujn pli altajn specojn de sensado oni nomis per la malsukcesa termino "klarvido".

<sup>29</sup>Oni ne povas riproĉi al la sciencistoj ilian mankon de emocia aŭ mensa sensado. Oni tamen rajtas postuli, ke ili ne kategorie ne la ekziston de tio, pri kio ili malhavas ĉian laŭlogikan rajton aserti ion.

<sup>30</sup>La filozofio ne lernigas al la homo pensi konforme al la realo. Anstataŭe ĝi lernigas, ke la homo nur eraras, kiam li provas pensi sen la necesaj faktoj. Tion la filozofoj ankoraŭ ne konceptis. Krome, ili malsukcesis solvi la plej evidentan el ĉiuj problemoj de la scio.

<sup>31</sup>La juĝo pri la okcidentlanda psikologio prefere estas lasata al la komprenema leganto de la sekvaĵo.

<sup>32</sup>Kiuj estas kontentaj pri siaj pensosistemoj (ne malpleje la skeptikuloj), tiuj certe konservu ilin. Ni ĉiuj devos relerni en novaj vivoj. Sed ekzistas kategorio de serĉantoj, kiuj instinkte scietas, ke necesas ekzisti io alia, io plia, ke ne povas esti tiel, kiel diras la erudiciuloj. Tiujn serĉantojn la esoterikisto deziras kontakti, ne por persvadi sed por peti ilin ekzameni la aferon logike. Se la esoteriko estas erara, devas esti eble refuti ĝin logike. Tamen ĝi ne estas refutita per la ordinara galimatio, kiun ĉiam prezentas tiuj, kiuj neniam ekzamenis la aferon.

<sup>33</sup>En la nuna evolustadio de la homaro la esoterika scio ne povas esti por la plejmulto alio ol labora hipotezo. Sed ju pli la homaro evoluos, des pli evidentiĝos la nekomparebla supereco de tiu hipotezo.

<sup>34</sup>Sistemo estas la maniero, en kiu la pensado orientas sin. Faktoj estas plejparte senutilaj antaŭ ol la racio povas meti ilin en iliajn ĝustajn kuntekstojn (historiajn, logikajn, psikologiajn aŭ kaŭzajn). Ĉia racia pensado estas bazata sur principoj kaj sistemoj. Ĉiu pensanta homo jam faris al si sistemojn, ĉu li konscias pri tio, ĉu ne. Sistemo donas korektan konceptadon kiel pri premo kaj sekvo de la pensado, tiel ankaŭ pri kaŭzo kaj efiko de objektivaj realaĵoj. La kvalito de la sistemo montras la evolunivelon, juĝokapablon kaj faktoscion de la individuo. La sistemoj de la plejmulto estas kredsistemoj de la emocia pensado, kiujn neniam faktoj povas ŝanceli. Per tio la individuo estas atinginta sian maturiĝpunkton, la limon de sia ricevemeco, kaj estas kaptito en la malliberejo de siaj propraj pensoj.

<sup>35</sup>Tiel granda estas la nescio pri la ekzistado, ke la dogmaj sistemoj de la teologio, la spekulativaj sistemoj de la filozofio kaj la primitivaj hipotezaj sistemoj de la scienco povadis esti akceptataj kiel kontentigaj eksplikoj.

<sup>36</sup>Serĉantoj de la vero ekzamenas la originajn faktojn aŭ bazajn hipotezojn de ekzistantaj sistemoj, la internajn kontraŭdirojn de la sistemo, ĝiajn sekvojn kaj ĝian eblon de raciaj klarigoj.

<sup>37</sup>Estas multaj homoj, kiuj jam ĉe la unua kontakto kun la esoteriko trovas ĝin senpere evidenta. Estas nome tiel, kiel Platono asertis, ke la scio estas rememoro. Ĉion, kion ni povas tuj percepti, koncepti, kompreni, ni jam asimilis en antaŭaj enkarniĝoj. Ankaŭ kvalitoj kaj kapabloj unu fojon akiritaj restas latentaj, ĝis ili havos okazojn disvolviĝi en nova enkarniĝo. La kompreno de la malnova restas, kiel ankaŭ la dispozicioj por kapabloj, kaj ekzemplo de tio estas la alie nekomprenebla fenomeno de la geniulo.

<sup>38</sup>La esoterikisto sin turnas kun sia sistemo al tiuj, kiuj restis serĉantoj ne kontentiĝintaj per la regantaj sistemoj. Li trankvile atendas la tagon, kiam la scienco estos konstatinta tiom da faktoj ĝis tiam esoteraj, ke ĝi jam ne povos rifuzi akcepti la esoterikon kiel la solan efektive teneblan laboran hipotezon.

<sup>39</sup>La netaksebla valoro de la esoterika scio estas en tio, ke ĝi liberigas de la superstiĉoj kaj ŝajna scio de la nescio, de iluzioj kaj fikcioj (konceptoj sen respondaĵoj en la realo) kaj rezultigas kompletan retakson de ĉiuj valoroj de la vivo kiel necesa sekvo de la scio pri la senco kaj celo de la vivo.

## 1.2 La esoteraj sciordenoj

<sup>1</sup>En la emocia stadio la homo bezonas ion firman por la emocio, en la mensa stadio ion firman por la penso, por ke li ne estu kiel junko skuata de la vento, kiel ŝipo sur la vasta maro, por ke li ne ŝajnu al si mem kiel paŝanto sur senfunda flosmarĉejo. Ĝis nun tiu "io" ne respondis al la realo.

<sup>2</sup>Ĉar la homaro neniam memstare povos akiri scion pri la ekzistado, pri ĝia senco kaj celo, aŭ scion pri la kosma realo kaj vivo, tial la homaro ĉiam ricevis tiun scion donace – de kiuj, montriĝos en la sekvaĵo.

<sup>3</sup>Tio alportis certajn riskojn. La scio potencodona, la scio pri naturleĝoj, naturfortoj kaj iliaj uzado, ĉiam estis misuzata pro egoismaj celoj. Kaj kiuj ne povis koncepti la scion pri la realo, tiuj ĉiam ĝin tordis en superstiĉon kaj erarigajn doktrinojn.

<sup>4</sup>Scio alportas respondecon pri prava uzado de la scio. Misuzo de scio rezultigas perdon de la scio kaj, koncerne tutajn naciojn, ilian ekstermiĝon.

<sup>5</sup>Dufoje tutajn kontinentojn oni devis malaltigi en la profundojn de la maro: Lemurion kaj Atlantidon.

<sup>6</sup>Depost tiuj du malsukcesoj oni decidis, ke la scio estu instruata nur en sekretaj scilernejoj kaj nur al tiuj, kiuj estas atingintaj tian evolustadion, ke ili povas ĝuste kompreni kaj ne erare interpreti la scion ricevitan, kaj prave apliki ĝin por servado al la vivo. Ilin oni lernigis ĝuste pensadi. De antaŭ ĉirkaŭ 45 000 jaroj oni starigadis esoterajn sciordenojn ĉe nacioj antingintaj sufiĉe altan nivelon. Ĉar scio estas rememoro, tial kiuj neniam estis inicitoj, tiuj ne povis vidi la ĝustecon de la esoteriko.

<sup>7</sup>La sciordenoj havis plurajn gradojn. En la plej malsupra oni instruis zorge ellaboritajn simbolojn, novmaniere interpreteblajn en ĉiu pli supra grado, tiel ke nur tiuj povis elkompreni la tutajn, kiuj atingis la plej supran gradon. La procedado enhavis certajn riskojn, ĉar kiuj ne ricevis la plej supran gradon, tiuj formis proprajn erarajn pensosistemojn.

<sup>8</sup>Por la neallasitajn en ĉi tiujn ordenojn oni fondis religiojn, respondajn al la komprenaj ebloj de diversaj nacioj kaj al iliaj bezonoj de normoj por laŭcela agado.

<sup>9</sup>La rapida ĝenerala kleriĝo kaj la progreso de la scienco necesigis alian agadon. Ekde la 18-a jarcento senĉese pliakriĝis la batalado inter "kredo kaj scio" (kiujn ne povoscias diferencigi tiuj, kiuj kredas ke ili scias, konceptas, komprenas). (Ĉiuj, al kiuj mankas la ekzakta scio pri la realo, estas kredantoj, ankaŭ tiuj, kiuj diras, ke ili kredas nenion.) Tiu batalado komenciĝis per la kontraŭreligia kaj la kontraŭmetafizika klerisma filozofio kaj akriĝis ĉiam pli dum la 19-a jarcento kun la akiroj de la naturesplorado. Laplace kun sia *Système du monde* ("La mond-sistemo"), Lamarck, Darwin, Spencer kaj Haeckel kun la evoluteorio, Lange kun sia "Historio de la materiismo" kaj aliaj konvinkis la sciencistojn, ke ili "ne bezonas la hipotezon pri iu spirita mondo". Iliaj atakoj kontraŭ pli malnovaj vivrigardoj rezultigis ĉiam pli sovaĝigan malorientiĝadon, tiel ke fine la homoj "sentis sin ĉiam pli dubaj pri tio, kio estas justa kaj maljusta. Ili estas eĉ necertaj, ĉu justeco kaj maljusteco estas io alia ol malnova superstiĉo." Ekzistas risko, ke la homaro pro sia malsaĝo ekstermos sin mem.

<sup>10</sup>Iĝis necese apliki rimedojn por kontraŭigi al tiu frenezo, kaj oni decidis malesoterigi tiun sendanĝeran parton de la esoterika scio, kiun la homaro nuntempe povas koncepti, kvankam ne kompreni ĝian gravecon. Per tio la homaro ekhavis eblon formi al si racian koncepton pri la realo kaj pri la vivo, kiel ankaŭ pri la senco kaj celo de la ekzistado.

<sup>11</sup>Kredo ne estis permesata en la esoteraj ordenoj. Tie temis pri konceptado kaj kompreno, ne pri kredo. En la plej malsupra grado oni lernis distingi inter kredo kaj supozo. Kredo estas la absoluta kaj malcedema konvinkiĝo de la emocio, neimpresibla per korekto kaj racio. Ĉiu homo havas sian kredeton pri preskaŭ iu ajn absurdaĵo. Kaj tiel estas, ĉar la homaro ne havas eblon de efektiva scio pri io alia ol definitive konstatitaj faktoj en la fizika mondo. Supozo kontraŭe estas provizora, validas ĝis oni havas scion, estas influebla per racia argumentado kaj deziras ĝustigon. Aŭtoritatuloj validu en ĉiuj regionoj de la vivo. Sed iliaj supozoj ne estas la fina instanco por la sana prudento, kiu, kvankam malsama ĉe ĉiu (la sinteza vivinstinkto akirita de la individuo tra

siaj enkarniĝoj), estas tamen la plej alta prudento, kiun ĉiuj devas strebi disvolvi.

<sup>12</sup>Dum la lastaj du mil jaroj furiozas senĉesa batalado inter diversaj idiologioj, batalado inter teologio kaj filozofio, teologio kaj scienco, filozofio kaj scienco.

<sup>13</sup>En la historio de la eŭropa filozofio montriĝas precipe la batalado inter teologio kaj filozofio. En ĉi tiu batalo la teologio preskaŭ ĉiam ricevis apogon de la politikaj regantoj. Kun neeldirebla penado kaj milionoj da martiroj la filozofio devis trabataladi sian progreson ŝtupon post ŝtupo, al pensa libero kaj parola libero, al toleremo kaj humaneco. Ĉi tiun venkon minacas anstataŭe la marksisma idiologio, kiu malpermesas al la individuo pensi iel ajn ol decidus la regantoj. Tio estas la nova pensa tiranismo. Ke la mensan evoluadon malhelpas tiu nova speco de idiotigado, devas kompreni eĉ simplaj intelektuloj.

<sup>14</sup>La batalado inter teologio kaj scienco komenciĝis per Galilei kaj daŭras ankoraŭ.

<sup>15</sup>La bataladon inter filozofio kaj scienco oni ĉesigis, almenaŭ provizore, post kiam la filozofoj definitive fariĝis aŭ agnostikuloj, neantaj la eblon konstati superfizikajn faktojn, aŭ kontraŭmetafizikuloj, neantaj la ekziston de la superfizika realo.

<sup>16</sup>En la historio de la filozofio, kiu efektive komenciĝas per la sofistoj, ni povas sekvi la penadon de la homa racio memstare, sen esoterika scio kaj disponante nur la fizikan sensadon, solvi la problemojn de la ekzistado.

<sup>17</sup>Evidentiĝos per la sekvaĵo, ke tio necese estis malsukcesonta. Sed nur en nia tempo oni ĝenerale komencas kompreni, ke tio estas nefarebla. Mankas al la scienco la perceptiloj necesaj por tio. Kaj la sciencisto rifuzas havi ian rilaton al tio, kio ne estas esporebla per la instrumentoj de la naturscienco. El logika vidpunkto tio estas plene defendebla.

<sup>18</sup>Estas motivo por atentigi, ke la hinda joga filozofio ne akordas kun la faktoj de la esoterika scio, sed ke ĝi estas bazata sur misinterpretado de tiaj faktoj. El la reenkarneĝado oni faris sencan metempsikozon, tian ke oni opinias, ke la homo povas renaskiĝi kiel besto, sen kompreno, ke reiro en pli malaltan naturregnon estas neokazebla. La evoluadon tra la minerala, vegetala, animala kaj homa regnoj oni opinias ĉesanta ĉe la eniro de la homo en la nirvanon kaj lia estingiĝo en ĝi sen kompreno de tio, ke la nirvano estas ne la fino sed la komenco. La hinda interpreto de manaso, buddhio, nirvano, atmo, karmo estas erariga, kiel ankaŭ la advaita absoluta subjektivismo, kiu malebligas scion pri la materia kaj movada aspektoj de la ekzistado.

### 1.3 La pruvoj de la hilozoiko

<sup>1</sup>Kiam la homoj kaptas novan vorton, tio pli-malpli rapide perdas sian originan signifon. Ili ĉiam kredas, ke ili scias al kia koncepto la vorto apartenas. Estas antaŭvideble, ke la termino "esoteriko", kiel ero de la vortaro de la amasoj, iĝos samsignifa al ia ajn afero.

<sup>2</sup>Bedaŭrinde estas risko, ke la esoteriko malbonfamiĝos per ĉia kvazaŭokultismo, kiu disvastiĝas senĉese. Ĉiam pli da literaturistoj de la nekompetenta speco, kiuj havas bonan flaron por profitaĵoj, jam rapidis aperigi ĉiaspecan galimatiion, ĉar tia havas rapidegan debiton, kiel ĉia alia aĉa literaturo. Detruinte sian senson de realeco per ĉiaspeca fikciismo, la homoj ŝatas pli fikciojn ol realaĵojn.

<sup>3</sup>Ekzistas ankaŭ klarviduloj similaj al Swedenborg, atestantaj tion, kion ili vidis en la "interna mondo". Ili devas pripensi la esoterikan aksiomon, laŭ kiu "neniu meminstruita viziisto iam ajn vidis korekte", ĉar la sekva mondo vere estas ŝajne simila al nia, sed efektive estas io tute malsimila al nia. Sen esoterika scio pri la tiurilataj kondiĉoj oni misinterpretas preskaŭ ĉion.

<sup>4</sup>Por tiuj, kiuj bezonas pruvojn de la korekteco (akordo kun la realo) de la esoteriko, ekzistas kvin pruvoj, ĉiuj sufiĉaj unuope kaj senkomparaj laŭ logika tenebleco. Tiuj kvin estas

la pruvo per logiko

la pruvo per klarigo

la pruvo per antaŭdiro

la pruvo per klarvido

la pruvo per eksperimento

<sup>5</sup>La pruvo per logiko konsistas en tio, ke la hilozoiko estas senkontraŭdira kaj nerefutebla

pensosistemo. Tia povas esti konstruita nek de homa intelekto nek sen scio pri la realo. Ĝi neniam povos kontraŭiĝi al la faktoj definitive konstatitaj de la scienco. Ĉiuj novaj faktoj trovos siajn lokojn en la sistemo. Ju pli la scienca esplorado progresos, des pli la esoteriko montriĝos kiel la sola tenebla labora hipotezo. Ĝi ne povas esti io alia por la plejmulto en la nuna evolustadio de la homaro.

<sup>6</sup>La pruvo per klarigo: La hilozoiko klarigas en la plej simpla, plej unueca, plej ĝenerala, senkontraŭdira kaj nerefutebla maniero milojn da realaĵoj alimaniere plene neeksplikeblaj.

<sup>7</sup>La pruvo per antaŭdiro: Jam ekzistas granda nombro de pruveblaj antaŭdiroj (sufiĉe multaj por plenigi volumon) pri eltrovoj, elpensoj kaj okazoj neantaŭvideblaj laŭ homa juĝkapablo, kiuj konfirmiĝis.

<sup>8</sup>La pruvo per klarvido: Kiel asertas ankaŭ hindaj raĝa-jogistoj, ĉiu volonta sin submeti al la trajnado necesa por tio, tiu povos disvolvi rudimentojn ankoraŭ dormantajn ĉe la homo sed fariĝontajn iam ĉiuhomaj kapabloj: nome la eblon akiri objektivan konscion en ĉiam pli altaj, nune nevideblaj, molekularaj specoj aŭ agregiĝaj statoj.

<sup>9</sup>La pruvo per eksperimento (magio). Tiu pruvo konsistas en tio, ke oni povas, per la scio pri la tiurilataj naturleĝoj kaj la metodo de iliaj aplikado kaj per helpo de fizik-eteraj materiaj energioj, okazigi ŝanĝiĝojn ankaŭ en malsubtila fizika materio. La magio tamen estas malpermesita pro pluraj motivoj. Ĝi armus ĉiajn eblajn banditojn de la homaro, tentante ilin al ĉiaspecaj krimoj. Sur la magiiston la sciencistoj metis la stampon de trompisto, ĉar tiaj fenomenoj estas neblaj, "kontraŭante al la naturleĝoj". La magiisto fariĝis martiro ankaŭ alimaniere. La sensaciemoj postulas ĉiam pli da sensacioj. La helpobezonantoj sieĝas sian viktimon per postuloj de helpo. La scivoluloj deziras, ke ĉiujn iliajn problemojn solvu li.

#### 1.4 LA BAZAJ FAKTOROJ DE LA EKZISTADO

<sup>1</sup>En la sekvaĵo estos donita populara prezento, en moderna vesto kaj por la unua fojo, de la esencaĵo de la sekreta doktrino Pitagorana. Pitagoro nomis la mondriĝadon hilozoiko (spiritua materiismo). Ĉia materio havas spiriton aŭ konscion. Ĉiuj mondoj estas spiritaj mondoj, supraj kaj malsupraj.

<sup>2</sup>*La problemoj de la realo* donas nur la plej fundamentajn faktojn por kompreni la sencon kaj celon de la vivo. Miloj da faktoj jam publikigitaj estas preterlasitaj por ke la prezento ne peziĝu. Pli detala pritrakto estas liverita en *De vises sten* ("La filozofa ŝtono") de Laurency.

<sup>3</sup>El sciteoria vidpunkto ĉio estas unuavice tio, kio ĝi ŝajnas esti, nome fizika materia realo, sed krom tio io tute alia kaj treege pli vasta.

<sup>4</sup>La ekzistado estas triunuo de tri egalvaloraj aspektoj: materio, movado kaj konscio. Neniu el tiuj tri povas ekzisti sen la du aliaj. Ĉia materio moviĝas kaj havas konscion.

<sup>5</sup>La materio estas kunmetita el praatomoj, nomitaj de Pitagoro monadoj, la plej malgrandaj eroj de la pramaterio kaj la plej eble malgrandaj firmaj punktoj por individua konscio.

<sup>6</sup>La origina kaŭzo de la movado estas la dinamika energio de la pramaterio.

<sup>7</sup>La konscio en la praatomoj estas dekomence potenciala (ne konscia), vekiĝas en la proceso de manifestiĝo iom post iom en aktualigitan, pasivan konscion, iĝonte post tio ĉiam pli aktiva en la ĉiam pli altaj mondoj de ĉiam pli altaj naturregnoj.

<sup>8</sup>Pitagoro komprenis, ke la helenoj posedas la antaŭkondiĉojn de objektiva konceptado pri la realo: sciencan metodecon kaj sistemecon. La kulturado de la konsciaspekto antaŭ ol estas metita la fundamento de kompreno de la materia realo rezultigas subjektivismon kaj senbridan fantazismon. Al Pitagoro ni ŝuldas la plejmulton da niaj fundamentaj realecaj konceptoj, kiujn klopodas elimini niaj modernaj konceptanalizistoj (nesciantaj pri la realo), per tio definitive nebligante konceptadon pri la realo. Pitagoro, kun la monaddoktrino, kaj Demokrito, kun la ekzotera atomdoktrino, povas esti rigardataj kiel la du unuaj sciencistoj laŭ okcidenta senco. Ili vidis, ke la materiaspekto estas la necesa fundamento de scienca rigardmaniero. Sen tiu fundamento oni ne ricevas ekzaktecon, esplorante la naturon kaj interrilatadon de la objektoj. Por la individua konscio ne ekzistas kontroleblaj limoj, sed ĝi havas tendencon droni en la konscimarego.

<sup>9</sup>En la sekvaĵo estos pli detale priskribitaj la tri aspektoj de la ekzistado, la konscievoluado en la diversaj naturregnoj kaj la granda Leĝo (la inkluzivaĵo de ĉiuj naturleĝoj kaj vivleĝoj). La scio pri la tri vivaspektoj estas necesa antaŭkondiĉo por kompreni la evoluadon de la naturregnoj.

## LA MATERIASPEKTO

### 1.5 La pramaterio

<sup>1</sup>La pramaterio, la ĥaoso de la helenoj, estas samtempe la senlima spaco.

<sup>2</sup>En tiu nemanifestiĝinta pramaterio, "preter spaco kaj tempo", ekzistas senlima nombro de kosmoj en ĉiuj diversaj stadioj de konstruiĝo aŭ malkonstruiĝo.

### 1.6 La kosmo

<sup>1</sup>Kosmo estas globo en la pramaterio. De komence ĝi estas negrandampleksa sed pligrandiĝas senĉese per alproviziĝo de praatomoj el la neelĉerpebla pramateria provizo, ĝis la necesa amplekso estas atingita. Sekve la "spaco" estas la materio.

<sup>2</sup>Kosmo plene elkonstruita, kiel nia, konsistas el kontinua serio da materiaj mondoj de malsamaj gradoj de denseco, la pli altaj penetrantaj ĉiujn pli malaltajn. La plej alta mondo do penetras ĉion en la kosmo.

<sup>3</sup>La mondoj estas elkonstruitaj de supre, de la plej alta mondo. Pli alta mondo provizas materialon al la tuj pli malalta, kiu estas formita en kaj el la pli alta.

<sup>4</sup>La kosmaj materiaj mondoj havas la nombron de 49, dividitaj en sep seriojn po sep mondoj en ĉiu serio (1–7, 8–14, 15–21, 22–28, 29–35, 36–42, 43–49). Tiuj atomaj mondoj okupas la saman spacon en la kosmo. Ĉiuj pli altaj mondoj ĉirkaŭas kaj penetras la pli malaltajn mondojn.

<sup>5</sup>La numeroj tri kaj sep, kiujn la tiel nomata spertularo ekspedas kun la kutima mokado, havas tre simplan eksplikon. La numero tri dependas de la tri aspektoj de la ekzistado (la tri-unuo!!) kaj la numero sep de tio, ke sep estas la plej granda nombro de manieroj, en kiuj tri povas (laŭvice) kombiniĝi. Ankaŭ la rikano pro la "pitagorana numerologio" ĉesos, kiam la homoj komprenos iomete pli.

<sup>6</sup>La numerado de la mondoj estas farata de supre, de la plej alta mondo kiel la unua. Per tio indikiĝas, ke ili estis formitaj de supre. Ankaŭ estas facile determini, kiom da pli altaj mondoj restas atingotaj de la individuo, en kiu ajn pli malalta mondo li sin trovas.

<sup>7</sup>Ĉiuj 49 mondoj estas malsimilaj unu al la aliaj rilate al dimensio, daŭrado, materia kunmetiĝo, movado kaj konscio, depende de malsimila denseco de praatomoj.

<sup>8</sup>La sep plej malaltaj kosmaj mondoj (43–49) enhavas miliardojn da sunsistemoj. La plej malalta mondo (49) estas la fizika mondo.

<sup>9</sup>Nia kosmo estas perfekta organizaĵo.

### 1.7 La atoma materio

<sup>1</sup>La kosmo konsistas el praatomoj (nomataj de Pitagoro monadoj), kiuj kunmetiĝas en 49 ĉiam pli malsubtilajn specojn de atomoj en sep kontinuajn seriojn po sep atomspecoj en ĉiu serio. La 49 kosmajn mondojn formas tiuj atomspecoj.

<sup>2</sup>La tuj pli malalta atomspeco estas konstruita el la tuj pli alta (la 2-a el la 1-a, la 3-a el la 2-a kaj tiel plu). La plej malalta atomspeco (49) do enhavas ĉiujn 48 pli altajn specojn. Ĉe la dissolviĝo de iu atomspeco estas ricevita la tuj pli alta atomspeco, el la fizika atomo estas ricevitaj 49 atomoj de la 48-a atomspeco.

<sup>3</sup>Ĉia materio (atomspecoj, molekulspecoj, agregaĵoj, mondoj kaj tiel plu) formiĝas kaj dissolviĝas. Nur la praatomoj estas eternaj kaj nedetruiblaj. La proceso de kunmetiĝo en malaltajn materispecojn nomiĝas involvado, kaj la responda proceso de disiĝo nomiĝas evolvido. Ju pli malalta estas iu materispeco, des pli involvintaj estas la praatomoj.

<sup>4</sup>La atommaterio estas laŭnature dinamika.

## 1.8 Spaco kaj tempo

<sup>1</sup>La spaco, kiu en la absoluta senco ne estas spaco, estas la pramaterio senlima.

<sup>2</sup>La spaco en kosma senco ĉiam estas globo. La kosmo estas globo. La sunsistemoj estas globoj. La planedoj estas globoj. La mondoj en la planedoj estas globoj. La kosmaj atomaj mondoj okupas la saman "spacon" kiel la fizika mondo, ekzistas ĉie en la kosma globo. La planedaj molekularaj mondoj estas malsamradiusaj deire el la centro de la planedo. La pli altaj mondoj penetras la pli malaltajn. "Pli alta kaj pli malalta" rilate atomajn mondojn oni ne komprenu en spaca senco. Rilate molekularajn mondojn "interna kaj ekstera" estas pli ekzaktaj.

<sup>3</sup>La globa formo de la molekularaj mondoj dependas de tio, ke la diversaj materispecoj grupiĝas laŭ denseco samcentre ĉirkaŭ origina fortocentro.

<sup>4</sup>Ĉiu atomspeco havas sian dimension. Sekve ekzistas entute 49 dimensioj en la kosmo. Dimensio en la kosma senco signifas specon de spaco. La fizika materio havas unu dimension (linion kaj areon oni ne enkalkulas), la plej alta materio havas 49. Kun la 49-a dimensio la kosmo fariĝas punkto por la praatoma konscio.

<sup>5</sup>Tempo signifas nur daŭron, pluan ekziston. Tempo estas diversaj manieroj, en kiuj mezuri la movadon, diversajn specojn de manifestiĝaj proceoj. Fizika tempo estas determinata de la turniĝo de la tero kaj ĝia rondiro ĉirkaŭ la suno.

## 1.9 La sunsistemoj

<sup>1</sup>La globoj de la sunsistemoj estas kopioj de la kosmo treege malpliskaligitaj kun la tuta implico de tio koncerne limiĝon en ĉiuj rilatoj, ne malpleje rilate konscion.

<sup>2</sup>Milionoj da sunsistemoj ankoraŭ ne atingis la fizikan gazan molekulspecon. Ĉe milionoj ilia fizika mondo estas definitive malkonstruita. Milionoj troviĝas en "pralajo" kun siaj sunoj dissolvitaj, atendante novan "tagon de Brahma", kiam nova suno eklumos. La sunoj estas transformatoroj, kiuj transformas atoman materion en molekulan. Tio, kion ni vidas, estas nur ekstera fizika gaza kovraĵo.

<sup>3</sup>La sunsistemoj havas sep mondojn, kunmetitajn el la sep plej malaltaj atommaterioj (43–49). La plej alta mondo de la sunsistemoj formiĝas el la 43-a atomspeco, la plej malalta (fizika) mondo el la 49-a. En la diversaj sciordenoj oni nomis tiujn sep mondojn per diversaj terminoj. La plimulto da ili estas malnovaj, pro la misuzado de la nesciularo neklaraj, ambiguaj, sensencaj kaj sekve netaŭgaj. Ja tre urĝas, ke ni ekhavu komunan internacian terminaron, kaj tiam la matematika kompreneble estas la sola laŭcela kaj la plej ekzakta. Tial ĝi estos konsekvence aplikata mal-supre. Tamen, por plifaciligi la komparon por la interesiĝintoj estos menciitaj kaj la sanskritaj terminoj uzataj en Hindio kaj tiuj uzitaj en *La filozofa ŝtono* de Laurency.

Sanskrite la sep sunsistemaj mondoj nomiĝas jene:

43 satja	43 adi aŭ mahaparanirvana
44 tapas	44 anupadaka aŭ paranirvana
45 ĝana	45 nirvana aŭ atma
46 mahar praĝapatja	46 buddhi
47 mahendra	47 manas
48 antarikŝa	48 kama
49 bhū	49 sthula

Ĉe Laurency ili ricevis la jenajn okcidentajn terminojn:

- 43 la manifestala mondo
- 44 la submanifestala mondo
- 45 la superesenciala mondo
- 46 la esenciala mondo
- 47 la kaŭzala-mensa mondo
- 48 la emocia mondo
- 49 la fizika mondo

### 1.10 La molekula materio

<sup>1</sup>Molekuloj estas kunmetitaj el atomoj. Ju pli malalta estas iu molekulspeco, des pli da atomoj enestas en la molekulo.

<sup>2</sup>Atomoj estas kunmetitaj el praatomoj. Ju pli malalta estas iu atomspeco, des pli da praatomoj enestas en la atomo.

<sup>3</sup>Tiuj difinoj estas la solaj esoterike teneblaj.

<sup>4</sup>La materio de la sunsistemoj nomiĝas molekula materio kontraste al la kosma atoma materio. Interne de la sunsistemoj la sep plej malaltaj atomspecoj transformiĝas en molekulspecojn.

<sup>5</sup>Ĉiu atomspeco provizas materialon por ses sukcesive pli kunmetitaj molekulspecoj, en kio la tuj pli malalta formiĝas el la tuj pli alta. El la sep atomspecoj estas do ricevataj 42 molekulspecoj, kaj tiuj konsistigas la sunsistemon. La 49 atomspecoj ekzistas en ĉiuj mondoj, okupas la saman spacon.

<sup>6</sup>La ses molekulspecoj interne de ĉiu sunsistema mondo ricevis analogiajn nomojn kaj matematikajn terminojn:

- (1 atoma)
- 2 subatoma
- 3 superetera
- 4 etera
- 5 gaza
- 6 likva
- 7 solida

<sup>7</sup>Tiuj ciferoj por la molekulspecoj estas metataj post tiu de la atoma termino. Tiamaniere la fizika gaza molekulspeco estas skribata 49:5.

<sup>8</sup>La tiel nomata atomo de la ĥemia scienco estas fizika etera molekulo (49:4). Tiu molekulspeco enhavas, kiel ankaŭ ĉiuj aliaj molekulspecoj, 49 diferencajn tavolojn de materio. Por atingi ĝis la efektiva fizika atomo (49:1) la nukleaj fizikistoj devas tralabori 147 ĉiam pli altajn materispecojn. Ĝis tio atingos nenia fizika scienco.

<sup>9</sup>Menciinde estas en ĉi tiu rilato, ke la "elementoj" de la antikvuloj (kiujn priridas la ĥemiistoj) – tero, akvo, aero, fajro kaj kvintesenco – koncernis ĝuste la kvin pli malaltajn molekulspecojn.

### 1.11 La planedoj

<sup>1</sup>La tri plej altaj sunsistemaj mondoj (43–45) estas komunaj por ĉiuj akirintaj en la sunsistemo objektivan konscion en la respondaj materispecoj. Tiuj estas individuoj, kiuj forlasis la homan aŭ kvaran naturregon kaj transiris en pli altajn regnojn.

<sup>2</sup>La kvar plej malaltaj sunsistemaj mondoj (46–49) nomiĝas ankaŭ planedaj mondoj. Kaj ĉi tie ni proksimiĝas al la mondoj de la homo, kiujn lerni kompreni estas al li necese, se li ne volas resti nescianta pri sia propra ekzistado, tute nekonside la ekzistadon ceteran. Se li ne scias iom pri siaj mondoj, li restas senhelpa viktimo de ĉiaj idiologioj, iluzioj kaj fikcioj de la nescio en religio, filozofio kaj scienco. Sen tiu scio li ne povas pensi laŭ la realo.

<sup>3</sup>Por faciligi al la monadoj ilian konscievoluadon en ĉi tiuj plej malaltaj mondoj, la tri plej malaltaj atommondoj (47–49) estas dividitaj en kvin apartajn molekulmondojn. La mondo 47 estas dividita en la supran (aŭ kaŭzalan, 47:2,3) kaj la malsupran (47:4-7) mensan mondon. La mondo 49 estas dividita en la fizikan etermondon (49:2-4) kaj la mondon videblan al la homo (49:5-7) kun ĝiaj tri agregiĝaj statoj (la solida, likva kaj gaza statoj).

<sup>4</sup>La konscievoluado en la kvar pli malaltaj naturregnoj okazas en tiuj kvin molekulmondoj.

<sup>5</sup>La videblan mondon (49:5-7) oni povas nomi tiu de la mineraloj, la fiziketeran mondon (49:2-4) tiu de la vegetaĵoj, la emocian mondon (48) tiu de la bestoj kaj la mensan mondon (47:4-7) la aparte homa mondo rilate la konscion. Iuj dividas la mensan mondon en tri partojn: la kaŭzalan (47:1-3), la supran mensan (47:4,5) kaj la malsupran mensan (47:6,7) mondojn. La supra mensa aŭ la kaŭzala mondo (47:1-3), la idea mondo de Platono, estas la celo de la homo

en la homa regno. Pli detala trakto de ĉi tio estas donita en la subsekcio pri la konsciaspekto.

### *1.12 La monadoj*

<sup>1</sup>La monadoj prezentas la solan enhavon de la kosmo. La monado estas la kiel eble plej malgranda parto de la pramaterio kaj la kiel eble plej malgranda firma punkto por individua konscio. Se iel oni provu imagi al si monadon, ĝin plej bone oni imagu kiel punkton de forto.

<sup>2</sup>Ĉiuj tiuj materiformoj, kiuj ekzistas en la kosmo, konsistas el monadoj en diversaj stadioj de disvolviĝo. Ĉiuj tiuj kunmetaĵoj el monadoj formiĝas, ŝanĝiĝas, dissolviĝas kaj reformiĝas en sennombraj variadoj. La materiaspekto de la monadoj tamen restas eterne la sama.

### *1.13 La monadkovriloj*

<sup>1</sup>La konscievoluado de la monadoj okazas en kaj per kovriloj. Ĝuste per la akirado de konscio en siaj kovriloj kaj en la ĉiam pli altaj materispecoj de tiuj kovriloj la monado atingas ĉiam pli altajn naturregnojn.

<sup>2</sup>Ĉiuj formoj de la naturo estas kovriloj. En ĉiu atomo, molekulo, organismo, mondo, planedo, sunsistemo kaj tiel plu troviĝas monado en pli alta evolustadio ol la ceteraj monadoj en tiu naturformo. Ĉiuj formoj krom la organismo estas agegajaj kovriloj, elektromagnete kuntenataj molekuloj el la materispecoj de la respektivaj mondoj.

<sup>3</sup>En nia sunsistemo ekzistas organismoj nur sur nia planedo. Sur la ceteraj planedoj ankaŭ la plej malalta kovrilo (49:5-7) estas agregaĵa kovrilo.

### *1.14 La kvin kovriloj de la homo*

<sup>1</sup>La kovriloj de la homo, enkarniĝinta en la fizikan mondon, havas la nombron de kvin:

organismo en la videbla mondo (49:5-7)

kovrilo el fizika etermaterio (49:2-4)

kovrilo el emocia materio (48:2-7)

kovrilo el mensa materio (47:4-7)

kovrilo el kaŭzala materio (47:1-3)

<sup>2</sup>El tiuj kvin la kvar pli malaltaj renoviĝas en ĉiu enkarniĝo kaj dissolviĝas laŭvice ĉe la fino de la enkarniĝo. La kaŭzala kovrilo estas la sola daŭra kovrilo de la homo. Ĝi estis akirita ĉe la transiro de la monado el la animala regno en la homan regnon. Estas la kaŭzala kovrilo la "efektiva" homo, enkarniĝanta kun la homa monado ĉiam enfermita interne de si.

<sup>3</sup>La ciferoj inter krampoj indikas la molekulspecojn ekzistantajn en la diversaj kovriloj. La pli altaj kovriloj enfermas kaj penetras ĉiujn pli malaltajn.

<sup>4</sup>La kvar agregaĵaj kovriloj estas ovoformaj kaj etendiĝas inter 30 kaj 45 cm for de la organismo, konsistigante la tiel nomatan aŭron. Proksimume 99 procentoj da la materioj de tiuj kovriloj altiriĝadas al la organismo, kaj tial la agregaĵaj kovriloj formas kompletajn kopiojn de la organismo.

<sup>5</sup>Tiuj kovriloj havas siajn apartajn taskojn. Sen fizika etera kovrilo la individuo ne havus sensajn perceptojn, sen emocia kovrilo li ne havus sentojn kaj sen mensa kovrilo li malhavigus pensadkapablon. La ekzisto de tiuj kovriloj en la homa organismo ebligas al la tiurilataj diversaj organoj, dum ili funkciadas, plenumi siajn taskojn. Devus esti substrekite, ke ĉiu ĉelo de la organismo, ĉiu molekulo de la ĉelo, enhavas fizikajn atomojn, kiuj siavice entenas ĉiujn 48 pli altajn specojn de atomoj.

<sup>6</sup>Ĉiuj pli altaj kovriloj, kiel ankaŭ la organismo, havas siajn specialajn organojn (el atomoj), ejojn de la diversaj specoj de konsci- kaj movadfunkcioj. Tiuj atomorganoj en la etera, emocia, mensa kaj kaŭzala kovriloj komunikas unu kun la aliaj.

<sup>7</sup>Ĉar la homo havas tendencon ĉiam identigi sian mion (sian monadon, la pramion) kun tiu kovrilo, en kiu li sin trovas dumtempe, li sin rigardas en la fizika mondo kiel fizikan mion, en la emocia mondo kiel emocian mion, en la mensa mondo kiel mensan mion kaj en la kaŭzala

mondo kiel kaŭzalan mion – ne eĉ scietante, ke li estas monado, pramio.

<sup>8</sup>Estas ja neeviteble en la stadio de nescio, ke en subjektiva rilato la homo rigardas siajn sentojn kiel sian esencon, kiam li estas emocie aktiva, aŭ, kiel ĉefe pensanta homo, rigardas la pensojn kiel sian veran esencon. Li kredas, ke li estas tio, kun kio li sin identigas dumtempe.

<sup>9</sup>La mio scias nur tion, kion ĝi mem spertis, prilaboris kaj realigis, kio ekzistas en ĝiaj kovriloj, kion ĝi povis akiri en siaj mondoj.

## LA KONSCIASPEKTO

### *1.15 La monadkoscio*

<sup>1</sup>La monadkoscio povas esti potenciala, aktualigita, pasiva, aktivigita, memaktiva, latentia, subjektiva, objektiva.

<sup>2</sup>La potenciala koscio de la monado estas vivigita (aktualigita) en la kosmo. Unu fojon aktualigita, la koscio estas dekomence pasiva, aktivigita en la evoluproceso, ĝis ĝi fariĝas ĉiam pli aktiva en la vegetala kaj animala regnoj, iĝante en la homa regno memaktiva kaj per tio akirante konscion pri si mem kiel sia propra mio.

<sup>3</sup>La termino "monado" signifas la individuon kiel praatomo kaj "mio" la konsciaspekton de la individuo.

<sup>4</sup>La termino "mio" apartenas ankaŭ al tiuj kovriloj, en kiuj la monado akiris memkonscion, kun kiuj la mio sin identigas, dumtempe rigardas kiel sian veran mion. La mio estas la centro de ĉiuj miperceptoj. La atento indikas la ĉeeston de la mio.

### *1.16 Diversaj specoj de koscio*

<sup>1</sup>Oni faras diferencon inter mikoscio (individua koscio, memkoscio en la kovriloj), kolektiva koscio kaj pramikoscio. (El teknikeca vidpunkto oni povas diferencigi kosman, sunsisteman kaj planedan konscion.)

<sup>2</sup>Ĉar la ekstremaj konsistigaj eroj de la universo estas praatomoj, la kosma totala koscio estas kunfandiĝo de la koscio de ĉiuj praatomoj, kiel la oceano estas la kuniĝo de ĉiuj akveroj (la plej proksima similaĵo trovebla).

<sup>3</sup>La plej grava kompreno estas tio, ke ĉia koscio estas samtempe kolektiva koscio. Tio dependas de tio, ke ne ekzistas persona izoliteco, kvankam nur tiuj povas vivi en la kolektiva koscio, kiuj estas akirintaj esencialan konscion (46).

<sup>4</sup>Ekzistas sennombraj specoj de kolektiva koscio: atoma, molekula, agregaĵa, monda, planeda, sunsistema koscio kaj poste diversaj specoj de kosma koscio. Ju pli altan regnon la monado atingas, des pli ampleksa estas tiu kolektiva koscio, en kiu la mio, kun sia mikoscio konservata, spertas aliajn miojn kiel sian propran pli vastan mion.

<sup>5</sup>Oni povas esprimi la saman aferon ankaŭ tiel, ke ĉia koscio en la tuta kosmo prezentas komunan, neeviteblan, nedisigeblan unuaĵon, en kiu ĉiu individuo havas pli aŭ malpli grandan parton, depende de la evolunivelo atingita de li.

<sup>6</sup>Same kiel pli altaj specoj de materio penetras pli malaltajn specojn, tiel pli altaj specoj de koscio perceptas pli malaltan konscion. Kontraŭe pli malalta ne kapablas percepti la pli altan, kiu ĉiam ŝajnas neekzistanta.

<sup>7</sup>La kapablo de la koscio pliiĝas je ĉiu pli alta atomspeco en kontinua serio, kies produktoj sukcesive multiplikiĝas per si mem (sekve  $2 \times 2 = 4$ ,  $4 \times 4 = 16$ ,  $16 \times 16 = 256$ ,  $256 \times 256$  kaj tiel plu).

<sup>8</sup>Atinginte la plej altan dian regnon kaj per tio akirinte plenan kosman kolektiva konscion, la monado jam ne bezonas kovrilojn, en kiuj disvolvi konscion. Nur tiam ĝi ekkonas sin mem kiel la pramion, kiu ĝi ĉiam estis. Ĝis tiam ĝi identigis sin mem kun iu el siaj kovriloj. Ne estas do mirinde, se la nesciuloj vane serĉas sian mion, se multaj eĉ neas, ke ekzistas tia.

<sup>9</sup>Ĉiuj formoj en la tuta kosmo, ankaŭ tiuj en la plej altaj diregnoj, estas nur kovriloj por la praatomoj – mioj. Tiuj formoj, kiujn ni nomas "animo", "spirito", dio kaj tiel plu, estas la

kovriroj, kiujn la mio uzas en siaj diversaj evolustadioj.

<sup>10</sup>Al diversaj specoj de konscio oni povas alkalkuli ankaŭ subjektivan kaj objektivan konscion, mikkonscion en la diversaj kovriroj de la individuo, super- kaj subkonscio, la memoron kaj la perceptojn fare de la individuo de siaj volesprimoj.

### *1.17 Subjektiva kaj objektiva konscio*

<sup>1</sup>La konscio estas subjektiva. Sensaj perceptoj, sentoj, pensoj estas subjektivaj. Ĉio, kion la konscio perceptas ekster si mem, estas materia kaj per tio objektiva.

<sup>2</sup>Sensado estas objektiva konscio, la percepto, fare de la konscio, de la objektiva materia realo en ĉiuj mondoj. Objektiva konscio estas (subjektiva) percepto de materia objekto. Oni diferencigas inter fizika, emocia, mensa, kaŭzala kaj tiel plu sensado.

<sup>3</sup>Racio estas la kapablo de imagado, abstraktado, konceptado, pripensado, deduktado, juĝado kaj tiel plu. La racio estas la instrumento por prilaborado de la enhavo de la sensado. La racio povas subjektive percepti la vibradojn ("antaŭscieton" kaj tiel plu) longe antaŭ ol la sensado povas ilin rilatigi al materia realo. Nur tiam, tamen, post kiam ekfunkcias la sensado, oni povas uzi la vorton "scio".

<sup>4</sup>En la nuntempa evolustadio de la homaro la plejmulto da homoj povas objektivaj konscii en siaj organismoj nur en la tri pli malaltaj fizikaj agregiĝaj statoj (49:5-7). Objektivan konscion pri materiformoj en pli altaj molekulspecoj oni nomis per la neklara termino "klarvido".

<sup>5</sup>Ĉio subjektiva havas sian objektivan respondecon. Al ĉiu emocio respondas la konscio de emocia molekulo, al ĉiu penso tiu de mensa molekulo, al ĉiu intuicio tiu de kaŭza molekulo kaj tiel plu. La materiaspekto indikas la konscispecon.

### *1.18 Fizika konscio*

<sup>1</sup>Fizika konscio estas la plej malalta speco de konscio, same kiel fizika materio estas la plej malalta speco de materio kaj fizika energio estas la plej malalta speco de forto.

<sup>2</sup>Fizika konscio estas (krom la fizika atomkonscio) de ses malsamaj ĉefaj specoj, respondaj al subjektivaj kaj objektivaj perceptoj en la ses fizikaj molekulspecoj.

<sup>3</sup>La responda validas por ĉiuj pli altaj mondoj.

<sup>4</sup>La homa fizika konscio estas parte la diversaj specoj de sensaj perceptoj de la organismo, parte la spertado, por la plejmulto nur subjektiva, de la vibradoj en la tri pli altaj fizikaj molekulspecoj (49:2-4).

### *1.19 Emocia konscio*

<sup>1</sup>La emocia konscio de la homo estas la konscio de lia monado en lia emocia kovrilo.

<sup>2</sup>Dum fizika enkarniĝo la emocia konscio estas por la plejmulto da homoj en la nuntempa homara evolustadio nur subjektivaj spertoj de la vibradoj en la emocia kovrilo.

<sup>3</sup>La emocia konscio estas laŭnature ekskluzive avido aŭ tio, kion la individuo en la emocia stadio spertas kiel dinamikan volon. En la barbara stadio, antaŭ ol estas ankoraŭ aktiviĝinta la konscio de la individuo en la mensa kovrilo, la avido esprimiĝas kiel pli-malpli neregataj impulsoj. Kun tio, ke la mensa kovrilo, influtate de la vibradoj de la emocia kovrilo, altiriĝadas kaj intertekstiĝadas kun la emocia kovrilo, la mensa konscio vekiĝas, kaj kunfandiĝas avido kaj penso. Ĉe tio, se la avido superregas, estas ricevita sento, kiu estas avido nuancita de penso. Se la penso superregas, estas ricevita fantazio, kiu estas penso nuancita de avido.

<sup>4</sup>La emocia vivo de la homo estas ĝenerale la vivo de emociaj iluzioj. Li estas viktimo de la dezira pensado de la avido, la iluzioj de la emocia pensado. Nur akirinte kaŭzalan konscion, la individuo komplete liberiĝas de la iluzioj.

<sup>5</sup>La vibradoj de la tri pli malaltaj emociaj molekulspecoj (48:5-7) estas ĝenerale repeliĝaj, tiuj de la tri pli altaj (48:2-4) altiriĝaj. Noblaj emocioj estas esprimoj de la altiriĝado.

### 1.20 Mensa-kaŭzala konscio

<sup>1</sup>La mensa konscio de la homo estas la memakirita kapablo de lia monado konscii en la mensa kovrilo (47:4-7), la kaŭzala konscio la sama en la kaŭzala kovrilo (47:1-3).

<sup>2</sup>La konscio de la mensa kovrilo estas de kvar specoj, respondaj al la eblo percepti la vibradojn en la kvar pli malaltaj mensaj molekulspecoj (47:4-7).

<sup>3</sup>La plejmulto da la homaro estas disvolvinta (aktiviginta) nur la plej malaltan specon (47:7), la diskursivan pensadon, kiu konkludas de premiso al sekvo.

<sup>4</sup>La dua speco kalkulita de malsupre (47:6), la filozofia kaj scienca princip-pensado, ankoraŭ reprezentas por ĉiuj, krom por la treege malmulta elito, la plej altan specon de pensado.

<sup>5</sup>La tria speco de malsupre (47:5), la elita pensado, estas, kontraŭe al la plejofte absolutiga princip-pensado, efektivigitaj unuflanke relativiga kaj procentiga pensado, aliflanke perspektiva kaj elsistema pensado.

<sup>6</sup>La plej alta speco de konscio en la mensa kovrilo (47:4) estas ankoraŭ neatingebla al la homaro. Ĝiaj esprimoj konsistas interalie en konkretigado de la kaŭzalaj ideoj, implicante samtempe pensadon per sistemoj anstataŭ per konceptoj.

<sup>7</sup>Ankaŭ la enhavo de la elita pensado konsistas plejparte el fikcioj (ideoj sen realaj respondoj) pro manko de faktoj pri la ekzistado. Nur la esoterikaj faktoj ebligas pensadon laŭrealan.

<sup>8</sup>La kaŭzala konscio (47:1-3) estas ebla nur por tiuj, kiuj estas en sia evoluo tiom progresintaj preter la cetera homaro, ke ili povas laŭcele prepari sin por la transiro en la sekvan pli altan regnon. Ili jam akiris la kapablon rilatadi kun ĉiuj en la kaŭzala mondo, la renkontejo de la individuoj apartenantaj tiel al la kvara, kiel ankaŭ al la kvina naturregnoj.

<sup>9</sup>La kaŭzala konscio estas subjektive intuicio, sperto de la kaŭzalaj ideoj, kaj ebligas la objektivan studadon de la fizika, emocia kaj mensa mondoj kaj ĉioscion en tiuj mondoj.

<sup>10</sup>Por la kaŭzala konscio ekzistas en planeda rilato (la homaj mondoj, 47–49) nek distanco nek pasinta tempo. La kaŭzala mio kapablas studi ĉiujn siajn antaŭajn vivojn kiel homo, kapablas memstare rapide proprigi al si la faktojn necesajn por intelekti ĉiujn realaĵojn en la homaj mondoj, pli multe dum unu horo (en 47:1) ol efike laboranta mensa konscio atingas dum unu jarcento. Fikcioj ne ekzistas.

### 1.21 Pli altaj specoj de konscio

<sup>1</sup>La jena resumo pri la diversal specoj de konscio en la sunsistemo eble plifaciligas la komprenon de tio, ke al la ĉiam pli altaj specoj de materio, materiaj kovriloj, materiaj mondoj respondas ĉiam pli altaj specoj de konscio.

- 49 fizika (kaj etera) konscio
- 48 emocia konscio
- 47 mensa-kaŭzala konscio
- 46 esenciala konscio
- 45 superesenciala konscio
- 44 submanifestala konscio
- 43 manifestala konscio

<sup>2</sup>Eble evidentiĝas per tiuj terminoj de la ĉiam pli altaj specoj de konscio, ke ĉiuj specoj krom la tri plej malaltaj (49–47) estas nekompreneblaj por la homaro en ĝia nuntempa evolustadio.

<sup>3</sup>La indiko de mio por iu individuo montras la plej altan mondon, en kiu li estas akirinta plenan subjektivan kaj objektivan memkonscion, kiel ankaŭ agipovon, ekzemple la akirinto de la kaŭzala konscio nomiĝas kaŭzala mio; tiu de la esenciala, esenciala mio aŭ 46-mio; tiu de la superesenciala, 45-mio; tiu de la submanifestala, 44-mio; tiu de la manifestala, 43-mio.

<sup>4</sup>Internacie la terminon "mio" eble pli oportune anstataŭus "monado", sekve 43-monado, 44-monado, 45-monado ktp.

### 1.22 *La nekonsciato de la mio*

<sup>1</sup>La konscio de la homo dividiĝas en maldorman konscion, subkonscion kaj superkonscion.

<sup>2</sup>La enhavo de la maldorma konscio de la enorganisma homo konsistas el sensaj perceptoj, emocioj, pensoj kaj volesprimoj.

<sup>3</sup>La subkonscio de la monado enhavas latentastatajn ĉiujn travivaĵojn kaj prilaboritajn spertojn de la monado depost vekigis ĝia konscio. Ĉiu enkarniĝo kvazaŭ demetas propran tavolon de konscio. Tio tuta konserviĝas kiel dispozicioj por kvalitoj kaj kapabloj, ordinare montriĝante kiel ebloj de kompreno. Por ke la dispozicioj aktualiĝu, estas necese ke ilin oni disvolvu en ĉiu nova enkarniĝo, tamen ĉiam pli facile.

<sup>4</sup>Al la superkonsciato apartenas ĉiuj ankoraŭ ne memaktivigitaj konsciregionoj en la molekulspecoj de la diversaj kovriloj de la individuo. La evoluado konsistas en la memaktivigado de la konscio kaj, per tio, la akirado de memkonscio en tiuj kovriloj.

<sup>5</sup>La homo senĉese ricevas impulsojn el sia subkonsciato, pli malofte inspirojn pere de sia superkonsciato.

<sup>6</sup>La maldorma konscio do estas treege eta frakcio de la monada ebleco de konscio.

<sup>7</sup>Ĉiujn kovrilojn de la individuo trafluas ĉiusekunde sennombraj vibradoj de ekstere (la emocian kovrilon la emocioj de la medio, la mensan globaj mensaj vibradoj). Treege malmulte da ili perceptas la maldorma konscio.

### 1.23 *La memoraroj de la individuo*

<sup>1</sup>Ĉiu kovrilo de la individuo havas sian konscion, sian memoraron, la subkonscian kolektivitan konscion de la diversaj molekuloj. Tiuj memoraroj neniigas kun la kovriloj. La kaŭzala kovrilo, daŭra en la homa regno, konservas la memoron pri ĉio, kion ĝi spertis depost sia ekesto.

<sup>2</sup>La rememoro estas la kapablo revivigi la vibradojn ricevatajn aŭ eligitajn de la kovriloj.

<sup>3</sup>Konsciesprimoj aktivigas la materion en la kovriloj. Konstantaj vibradoj (kutimoj, inklinoj kaj tiel plu) retenas "konstantigitajn atomojn" (sanskrite: skandha). Ĉe la dissolviĝo de la kovriloj tiuj eniras la kaŭzalan kovrilon, kunsekvas ĉe reenkarnejo, formante la latentan provizon de spertoj (inklinoj, dispozicioj kaj tiel plu).

<sup>4</sup>La memoraro de la praatomo estas nedetruibla kvankam latentaj. Por rememoro estas necesa renoviga kontakto kun realaĵo iam spertita. Kaŭzalaj mioj kaj pli altaj mioj kapablas tion en la planedaj kaj kosmaj globmemoraroj.

## LA MOVADASPEKTO

### 1.24 *Difino de la movado*

<sup>1</sup>Al la movadaspekto apartenas ĉiuj okazadoj, ĉiuj natur- aŭ vivprocesoj, ĉiuj ŝanĝiĝoj. Ĉio moviĝas, kaj ĉio, kio moviĝas, estas materio.

<sup>2</sup>Tradicie la movado havas multajn nomojn: forto, energio, aktiveco, vibrado ktp. Tien ĉi alkalkulendaj estas: sono, lumo kaj koloro.

<sup>3</sup>En la hilozoiko oni distingas tri laŭspece diferencajn ĉefajn specojn de movadkaŭzoj: dinamison, materian energion, volon.

### 1.25 *Dinamiso*

<sup>1</sup>La origina kaŭzo de la movado, la fonto de ĉia forto, la sola praforto, la ĉioenergio de la universo, estas la dinamika energio de la pramaterio, kian energion Pitagoro nomis dinamiso. Ĝi eterne aktivigas, neelĉerpebla, nekonscia, la absoluta ĉiopovo.

<sup>2</sup>Dinamiso aktivigas en ĉiu praatomo kaj nur en la praatomoj, kiuj penetras ĉian materion.

<sup>3</sup>Estas dinamiso la fundamenta kaŭzo de la "perpetuum mobile" de la universo.

### 1.26 *Materia energio*

<sup>1</sup>En la scienca signifo energio estas materio en movado. Ĉiuj pli altaj materispecoj (atomspecoj, molekulspecoj) estas energio rilate al ĉiuj pli malaltaj materispecoj.

<sup>2</sup>Materio dissolviĝas, ne en energion, sed en materion pli altan.

<sup>3</sup>Kiam la materio ĉesas moviĝi, ĉesas ĝia eco de energio.

<sup>4</sup>Ĉiuj naturfortoj estas materio. Ekzistas pli ol 2400 malsamaj specoj de naturfortoj interne de la sunsistemo. Ĉiu molekulspeco entenas 49 diferencajn tavolojn de materio, kiuj povas efiki kiel energio.

### 1.27 *La kosma movado*

<sup>1</sup>La kosma movado (interne de la 49 atomspecoj) ekestas per tio, ke el la plej alta atom-mondo konstanta fluego de praatomoj (unuagrada materio) malsupreniras tra la atomoj de ĉiuj mondoj ĝis la plej malalta. Tiuj praatomoj poste reiras al la plej alta mondo, daŭrigante denove sian cirkuladon dum estas necese, ke la pli malaltaj mondoj ekzistas. La atomoj estas de du specoj. En la negativaj (ricevaj) la materienergio fluas el pli alta en pli malaltan atomspecon, en la pozitivaj (pelaj) el pli malalta en pli altan. La atomojn, molekulojn, materiajn agregaĵojn retenas en iliaj donitaj formoj tiu fluego. Kaŭze de tio ĉiuj atomoj en ĉiuj mondoj kaj, sekve, ĉiuj molekuloj kaj agregaĵoj, radias materienergion, ĉe kio la agregaĵo ĉiam en iu rilato komunikas iom da sia individua karaktero. Ĉiu agregaĵo do elsendas specialigitan energion.

<sup>2</sup>Vibradoj ekestas pro tio, ke pli altaj materispecoj penetras pli malaltajn. Tiu fakto estigis la parolmanieron, ke ĉio konsistas el vibradoj.

### 1.28 *La volo*

<sup>1</sup>La volo estas la dinamisa efikado pere de la aktiva konscio. Aktiva konscio do estas la kapablo de la konscio lasi dinamison agi per si. La "volo" estas la individuigita maniero de la energio efikadi per la konscio, ĉe kio la esenca por ĉiam pli altaj mondoj estas la laŭleĝeco, laŭplaneco, laŭceleco kaj celkonscio de la konscienhavo.

<sup>2</sup>La esoterika aksiomo, ke "energio sekvas la penson", indikas, ke la esprimoj de la aktiva konscio igas la materion efikadi kiel energio.

<sup>3</sup>La magio estas scio de tiu metodo, per kiu oni povas per mensa materienergio influi fizik-eterajn materienergiojn kaŭzi ŝanĝiĝojn en la videblaj molekulspecoj. Tiu metodo restos esotera, ĉar la homaro estas tro senrimede nescia kaj tro egoisma por ke al ĝi estu konfidita tia terura potenco. Ĉar ĉia potenco estas malbonuzata (en plej favora okazo nur pro nescio), la homaro toleru malhavi la scion pri ĉiuj aliaj naturfortoj ol pri tiuj, kiujn ĝi mem sukcesas eltrovi. Tia scio estas konfidata nur al tiuj, kiuj neniam povas malbonuzi potencon.

<sup>4</sup>La konsciaktivigado en la tri plej malaltaj naturregnoj estas nekonscia kaj aŭtomata proceso, kiu iom post iom fariĝas konscia en la homa regno. En pli altaj regnoj ĝi estas la rezulto de memnaciita konsciaktiveco.

<sup>5</sup>En la emocia stadio la avido kaj en la mensa stadio la motivo estas la homa volo. La origina filozofia difino de la volo estis "la rilato de la konscio al iu celo".

### 1.29 *Diversaj specoj de energio kaj volo*

<sup>1</sup>Analoge al la materi- kaj konsciaspektoj ankaŭ la movadaspekto havas siajn sep specojn, nome la jenajn:

- 49 fizikaj energioj
- 48 emociaj energioj
- 47 mensa-kaŭzalaj energioj
- 46 esencialaj energioj
- 45 superesencialaj energioj
- 44 submanifestalaj energioj
- 43 manifestalaj energioj

<sup>2</sup>Kiu tion deziras, tiu povas ŝanĝi la vorton "energio" je tiu de "volo". La diversaj specoj de volo estas akiritaj samtempe kun plena subjektiva kaj objektiva memkonscio en la nomata mondo, aŭ kun la kapablo de la mio centriĝi sin en la tiurilatan kovrilon.

<sup>3</sup>La energioj aperantaj estas senpere la efikoj de pli alta molekulspeco sur la tuj pli malaltan interne de ĉiu mondo. La atomenergioj efikadas de mondo al mondo tra la atomspecoj.

### 1.30 LA SENCO KAJ CELO DE LA EKZISTADO

<sup>1</sup>La senco de la ekzistado (problemo nesolvebla por teologoj, filozofoj kaj sciencistoj) estas la konscievoluado de la praatomoj, estas la vekado en konscion de la praatomoj nekonsciaj en la pramaterio, kaj poste la lernigado al ili akiri konscion kaj komprenon de la vivo en ĉiuj ĝiaj rilataĵoj.

<sup>2</sup>La celo de la ekzistado estas la ĉioscio kaj ĉiopovo de ĉiuj en la tuta kosmo.

<sup>3</sup>Tiu proceso signifas evoluadon: rilate al scio, el nescio al ĉioscio; rilate al volo, el senpovo al ĉiopovo; rilate al libereco, el mallibereco al tiu potenco, kiun donas la aplikado de la leĝo; rilate al vivo, el izoliteco al unueco kun ĉiu vivaĵo.

<sup>4</sup>La mio evoluas en kaj per kovriloj, de la plej malalta fizika etera kovrilo ĝis kosma mondo. Ĝi senĉese akiras novajn kovrilojn en mondo post mondo. Paŝon post paŝo ĝi akiras mem-konscion en la ĉiam pli altaj molekulspecoj de sia kovrilo per tio, ke ĝi lernas aktivigi la konscion en tiuj. Per tio ĝi fine fariĝas majstro de sia kovrilo. Ĝis tiam ĝi estos malorientata en la konscihaoso de tiu kovrilo kaj viktimo de vibradoj de ekstere.

<sup>5</sup>La malnovaj, de la nesciularo ĉiam misinterpretataj terminoj, "animo", "spirito", "dio" kaj tiel plu, koncernis la kovrilojn de la mio en pli altaj mondoj. Per "animo" oni nomis la homan daŭran, la kaŭzalan kovrilon (la 47-kovrilon), per "spirito" lian estontan 45-kovrilon, per "dio" la 43-kovrilon.

<sup>6</sup>Atoma konscio estas monda konscio. La individuo kiel kunposedanto de iu konscikolektivo estas kvazaŭ ĉelo en organismo. La organismo estas kovrilo por individuo en pli alta regno. Evoluinte en la kolektiva konscio de sia mondo ĝis tiom, ke li povas transpreni tiun materimondon kiel propran kovrilon, la individuo estas la "dio" de tiu mondo.

<sup>7</sup>Atoma konscio, monda konscio, ĉioscio (en tiu mondo) ne signifas, ke la individuo scias ĉion pri ĉio estanta aŭ okazanta. Tamen li havas la eblon pli-malpli rapide informi sin pri io ajn, kion li deziras scii, sendepende de spaco kaj tempo pasinta en la koncerna mondo, konstati ĉiujn rilatojn en la tri aspektoj (materio, movado, konscio) de tiu mondo.

### 1.31 La "renaskiĝado" de ĉio

<sup>1</sup>Ĉiuj materiformoj (atomoj, molekuloj, agregaĵoj, mondoj, planedoj, sunsistemoj, agregaĵoj de sunsistemoj kaj tiel plu) submetiĝas al la leĝo de transformado. Ili formiĝas, ŝanĝiĝas, disiĝas kaj reformiĝas. Tio estas neevitebla, ĉar neniu materiformoj daŭre eltenas la eluzadon de la kosmaj materienergioj.

<sup>2</sup>La praatomoj konsistigantaj ĉiujn tiujn materiajn kuniĝaĵojn per tio havas okazajn de senĉese novaj spertoj en novaj formoj. Ĉiuj lernas el ĉio.

<sup>3</sup>Ĉiuj organismoj (vegetaĵoj, bestoj, homoj) ĉe la renoviĝo de la formo ricevas vivoformon similan, ĝis ilia konscievoluado postulas laŭspece diferencon, pli altan formon, pli laŭcelan eblon akiri plian spertadon.

<sup>4</sup>La homo renaskiĝadas kiel homo (kiel besto neniam), ĝis li estas lerninta ĉion, kion li povas lerni en la homa regno kaj estas akirinta ĉiujn necesajn kvalitojn kaj kapablojn por povi pluigi sian konsciekspansiadon en la kvina naturregno. La renaskiĝado klarigas unuflanke la ŝajnajn maljustaĵojn de la vivo (ŝajnaj, ĉar ĉiu devas en novaj vivoj rikolti tion, kion li jam semis en antaŭaj), aliflanke la denaskan latentan komprenadon kaj la dispoziciojn unufoje memakiritajn. Tiu scio faras ankoraŭ pli. Ĝi refutas ĝis 99 procentoj ĉion, kion la homaro akceptis kiel veron.

### 1.32 LA NATURREGNOJ

<sup>1</sup>La konscievoluado de la monadoj okazas en serio da ĉiam pli altaj naturregnoj: ses interne de la sunsistemo kaj ses en la kosmaj mondoj. La ses regnoj apartenantaj al la sunsistemo estas:

la minerala regno	49:7 – 49:5
la vegetala regno	49:7 – 48:7
la animala regno	49:7 – 47:7
la homa regno	49:7 – 47:4
la esenciala regno	49:7 – 45:4
la manifestala regno, unua aŭ plej malalta dia regno	49:7 – 43

<sup>2</sup>La monadkonscio aktiviĝas en kovriloj. Ĝi lernas percepti la vibradojn en la ĉiam pli altaj molekulspecoj de la kovriloj, akiras la eblajn en tiuj sperton kaj scion pri la materia kaj movada aspektoj, kiel ankaŭ la kapablon uzi komprenon akiritan. Ordinare la monado pasigas sep eonojn en ĉiu el la kvar plej malaltaj naturregnoj.

<sup>3</sup>El la jam dirita evidentiĝas, ke unuflanke ĉiu materispeco havas propran specon de konscio kaj propran specon de energio, aliflanke ĉiu naturformo estas vivaĵo havanta kolektivajn konscion kaj estas kovrilo por monado en pli alta regno ol la ceteraj monadoj en la kovrilo.

#### *1.33 La tri plej malaltaj naturregnoj*

<sup>1</sup>La transiro de la monadoj el la minerala regno en la vegetalan kaj el tio en la animalan kaj homan regnojn nomiĝas transmigrado. Tio ne povas okazi malantaŭen. Reiro el pli alta regno en pli malaltan nepre malestas. La "degenero" de la organismo kaj, krome, de ĉia alia materio ne koncernas la evoluadon de la monadoj, sed estas diseriĝo de materia kunmetaĵo, kiel ankaŭ estas la "radioaktiveco". La metalurgiistoj spertas ion, kion ili nomas "laciĝon" de metaloj.

<sup>2</sup>En la minerala regno komenciĝas la aktiviĝado de la monada konscio. En la plej malalta fizika molekulspeco (49:7) la monadoj lernas percepti la diferencojn de temperaturo kaj premado. Ĝuste en tiu regno la vibradoj iĝas sufiĉe fortegaj por ke ili permesu unuan percepton de interna kaj ekstera. Kaj per tio komenciĝas tiu objektiviĝa proceso de la konscio, kiu atingas sian perfektigon en la animala regno. Iom post iom la monadoj lernas percepti eksterajn realaĵojn. Treege malrapide tra la tri plej malaltaj regnoj la monadoj ekkonas sin mem kiel apartigitajn for de ĉio alia. Kiom da neimagebla penegado kostis tiu proceso, sendube malfacile ni prezentas al ni, trovante memkomprenebla la kontraŭon inter konscio kaj materia ekstera mondo. Je la rezulto de tiu objektiviĝa proceso la filozofoj klopodas senigi la homaron.

<sup>3</sup>La kontraŭada proceso pluiras en la homa regno, sed nune kiel kontraŭado inter la memkonscia mio kaj la ekstera mondo (inkluzive de aliaj mioj). Ĝi estas necesa por ke la individuo akiru memfidon kaj memdecidon, kiujn kvalitojn malhavante la individuo povas neniam ekhavi la potencon de la libereco. Ekzistas tamen la risko, ke iĝas absoluta la mempotenciĝado kaj per tio la izoliteco. Tio povas rezultigi la ŝiron de la ligilo kuniganta lin al la ekzistado. Ĝuste fariĝante ĉiam pli vasta mio kune kun ĉiuj aliaj mioj, la individuo akiras la kosman ĉioscion. La individuo devas lerni venki la mempotenciĝadon je la kosto de alia vivaĵo kaj kompreni la neceson de servado al la vivo. Tiam li trovos ankaŭ, ke tie estas la sola eblo de feliĉo, de ĝojo kaj de beato.

<sup>4</sup>Por transiri el pli malalta naturregno en pli altan la monado devas lerni ricevi la vibradojn, kaj adaptiĝi al la vibradoj, de ĉiam pli altaj molekulspecoj. Tiuj vibradoj dekomence plenumas necesajn vivigajn funkciojn en la kovriloj de la monadoj.

<sup>5</sup>Konscio en la minerala regno esprimiĝas iom post iom kiel tendenco al ripetado, kiu post sennombraj spertoj fariĝas kutimo organizita aŭ naturo. Ĉe pliiginta konscio ekestas instinkta strebado al adaptiĝo.

<sup>6</sup>Per sorbiĝado de vegetaĵoj kaj spertado de la viviga proceso en tiuj la minerala konscio lernas ricevi eterajn vibradojn kaj adaptiĝi al ili (laŭgrade ĉiam pli altajn ekde 49:4:7:7 al

49:4:1), la antaŭkondiĉo de eniro en la vegetalan regnon. En tiu regno la monado akiras la kapablon distingi inter altiriĝaj kaj repeliĝaj vibradoj, per kio estas farita la kontakto kun la emocia mondo (48:7). La vegetalaj monadoj evoluas plej rapide per tio, ke la vegetaĵojn elmanĝas bestoj kaj homoj kaj la monadoj per tio submetiĝas al la fortaj vibradoj de la bestaj kaj homaj emociaj kovriloj. Ĉar ili lernas percepti tiajn vibradojn, tial ili kapabliĝas iom post iom atingi pli altajn nivelojn en sia regno. En pli malaltaj regnoj la transmigrado okazas preskaŭ nerimarkeble. Inter la enkarniĝoj la animalaj monadoj estas enfermitaj en komuna kovrilo de mensa materio. Ju pli alte sin trovas iu besto en la skalo de la evoluado, des pli malmultaj monadoj enestas en ties grupo. Tiamaniere bilionoj da muŝoj formas unu propran grupanimon, milionoj da ratoj unu, centoj da miloj da paseroj unu, miloj da lupoj unu, centoj da ŝafoj unu propran grupon. Kaŭzaliĝi povas nur simio, elefanto, hundo, ĉevalo kaj kato, kiuj apartenas al tre malmultenombraj grupanimoj. Kiam pli animaloj elmanĝas pli malaltajn, la monadoj de la pli malaltaj animaloj eniras en la grupanimon de la pli altaj. Sed tio ne estas la okazo ĉe la homa elmanĝo de animaloj. La kaŭzala kovrilo de la homo ne estas grupanimo, kaj krome ne okazas la transmigrado al pli altaj regnoj tiamaniere, sed estas la rezulto de la propra konsciaktiveco de la individuo. La animalaj monadoj sekve ne trapasas la homan organismon, sed reiras al sia propra grupanimo. Anstataŭe al la evoluado estas kontraŭagante, ĉar animala karno krudigas la homan organismon, kies tasko estas strebado al "eteriĝo".

<sup>7</sup>Kiam la naturesplorado iufoje estos sperta pri la tiurilataj faktoj, ĝi eltrovos la kaŭzojn kaj efikojn de la konsciaktiviĝado. Tio precipe validas por esploristoj, kiuj havas denaskan eteran objektivan konscion, realaĵo ĉiam pli oftigiĝanta.

<sup>8</sup>La evoluniveloj interne de ĉiu regno plej bone aperas en la animala regno kun ĉiuj ĝiaj klasoj, de la plej malalta al la plej alta animala specio. Klasoj estas la natura ordo en ĉiuj regnoj. La naturaj klasoj indikas malsamajn aĝoklasojn, depende de la tempopunkto de la transmigrado de la monadoj.

<sup>9</sup>Je ĉiu pli alta regno (kaj ankaŭ je ĉiu pli alta nivelo en la sama regno) pliĝas la kapablo influigi de ĉiam pli ampleksaj serioj da vibradoj de ĉiam pli altaj molekulspecoj. Ekzistas 49 tiaj serioj interne de ĉiu molekulspeco.

<sup>10</sup>Kiam la monado jam dum longa tempo povas influigi de mensaj vibradoj (47:7) kaj per tio atingis la plej altan animalan specion, tiam ekzistas por ĝi la eblo transmigrigi al la homa regno.

### 1.34 La kvara naturregno

<sup>1</sup>Per akiro de kaŭzala kovrilo la monado transmigras de la animala regno al la homa regno. Oni prefere uzu la terminon "kaŭzaliĝo" por tiu proceso anstataŭ "individuigi", ĉar la monado estas individuo en ĉiuj regnoj.

<sup>2</sup>La kaŭzala kovrilo estas la daŭra kovrilo de la homa monado, ĝis ĝi esencialiĝas kaj transiras al la kvina naturregno. Estas ĉi tiu kovrilo, kiu enkarniĝas kaj ĉe tio involviĝas en kvar pli malaltajn kovrilojn baldaŭ diseriĝontajn.

<sup>3</sup>En la nuna ĝenerala evolustadio de la homaro la homa aktivigas la konscion ĉefe en siaj emocia kaj mensa kovriloj.

<sup>4</sup>La konscievoluadon en la homa regno oni povas dividi en kvin ĉefajn stadiojn kun 777 evoluniveloj entute. La jena tabelo montras, kiuj molekulaĵoj konscioj ĉe tio aktiviĝas.

<sup>5</sup> stadioj	molekulspecoj	
	emociaj	mensaj
barbara	48:5-7	47:7
civilizacia	48:4-7	47:6,7
kultura	48:3-7	47:6,7
humaneca	48:2-7	47:4-7
idealeca	48:2-7	47:2-7

<sup>6</sup>En *La filozofa ŝtono* de Laurency estas donita pli detala trakto de la diversaj evolustadioj.

<sup>7</sup>La nombro de individuoj alkalkulataj al la homaro de nia planedo, kaŭzaliĝintaj ĉi tie aŭ transigitaj ĉi tien, atingas ĉirkaŭ 60 mil milionojn. Ili sin trovas en la fizika, emocia, mensa kaj kaŭzala mondoj de la planedo, la plimulto da ili dormante en siaj kaŭzalaj kovriloj, ĉar ili malhavas eblon de kaŭzala konscio, atendante novan enkarniĝon.

<sup>8</sup>La transiro el la animala regno en la homan de tiuj monadoj okazis en kvin apartaj epokoj, la plej lasta antaŭ ĉirkaŭ 18 milionoj da jaroj, dum la individuoj de la kvar antaŭaj estis transigitaj pli malfrue el alia planedo. La kaŭzalaj kovriloj de la homoj do estas tre malsamaĝaj, kaj tio klarigas la diferencajn evolustadiojn. Kiuj estas atingintaj la plej altan stadion, tiuj jam trapasis ĉirkaŭ 150 mil enkarniĝojn; kiuj en la plej malalta, ĉirkaŭ 30 mil. Ĉe tio oni notu, ke la konscikapablo duobligas je ĉiu pli alta molekulspeco, kaj tial la nombroj mem ne estas kompareblaj en ĉi tiu rilato.

<sup>9</sup>La okcidentlanda deklaro, ke "dio kreis ĉiujn homojn egalaj", sekve estas tiom erara, kiel la fikcio de hindaj filozofoj, laŭ kiu "ĉiuj estas dioj". Dio ne povas krei unu solan monadon, nur havigi al la monadoj okazon eniĝi en kosman manifestiĝon. Vere ĉiuj monadoj iam atingos la plej altan dian stadion, tamen ili devas antaŭe involvadi malsupren al la fizika mondo kaj poste suprengrimpi la tutan, ŝajne senfinan, skalon de evoluniveletoj ekde la minerala regno ĝis la plej alta diregno.

<sup>10</sup>Devas esti evidente el la dirita, ke la moralaj opinioj reciprokaj de la homoj estas la kritikado de la nescio kaj la nerajtaj verdiktoj de la malamo. La homoj estas nek bonaj nek malbonaj. Ili troviĝas en certa evolunivelo kaj havas la komprenon propran al tiu kaj ne plian. Aldoniĝas al tio la efikoj de la leĝo de sorto kaj la leĝo de rikoltado. Estas grava por la kompreno ankaŭ la scio pri tio, ke en tempoj de renversado la klanoj de la plej altaj stadioj ne tre multe enkarniĝadas. Da la nune enkarniĝintaj pli ol 85 procentoj sin trovas en la du malaltaj stadioj. Da la restaj 15 procentoj la plejmulto estas inter la kvietuloj en ĉiu lando. Ili enkarniĝas ĉefe, se ili ne ricevis apartajn taskojn, en tiaj landoj, kie ili havas la plej bonan esperon trovi samnivelanojn. Tiuj en la humaneca stadio, kiuj ne havis okazon informi sin pri la esoteriko, sentas sian fremdulecon, ne komprenante la kialon kaj kulpigas sin mem pro tio. Bedaŭrinde tio estas la ordinara okazo. Ili estis iufoje iniciitoj kaj post tiam restas serĉantoj de "la perdita diro de la majstro" (la esoteriko). Ili posedas la scion kiel instinkton, nesuspektante ĝian kialon, kaj tial ili estas malcertaj.

<sup>11</sup>En la fizika mondo la homo estas organismo kun etera kovrilo. Lia fizika konscio estas duspeca. La sensaj perceptoj en la organismo igas lin percepti objektive la materiajn formojn en la tri pli malaltaj molekulspecoj. La vibradoj en la molekulspecoj de la etera kovrilo ankoraŭ estas por la plejmulto nur subjektive konsciataj. Videblaj realaĵoj estas la solaj, pri kiuj li scias kaj kiuj estas por li la nuraj realaj. Li prenas siajn sentojn kaj pensojn por nuraj subjektivaj perceptoj, ne suspektante, ke al ili respondas vibradoj en la molekulspecoj de pli altaj mondoj. Li nenion scias pri siaj pli altaj kovriloj, ne scias, ke kiam li spertas siajn sentojn, tiam lia atento (la monado) transmoviĝas al la emocia kovrilo kaj kiam li pensas, tiam al la mensa kovrilo. Li ne scias, ke li estas monado en kaŭzala kovrilo.

<sup>12</sup>La individuo en la barbara stadio kiel nura fizika mio sen menciinda emocia kaj mensa konscio apartenas al la plej malaltaj niveloj de la barbara stadio. Tuj post la kaŭzaliĝo li estas nemulte pli ol besto, ofte eĉ ne tiel inteligenta. Lia vivo en la emocia mondo inter la enkarniĝoj estas tre mallonga. Li baldaŭ falas en sensonĝan dormon en sia kaŭzala kovrilo, estante nekapabla uzi la konscion de sia mensa kovrilo. En la pli altaj niveloj de la barbara stadio la mensa konscio aktiviĝas en simplan konkludkapablon.

<sup>13</sup>Kiel emocia mio (en la civilizacia kaj kultura stadioj) la individuo estas regata de emociaj motivoj en sia pensado kaj agado. La emocia stadio estas la plej malfacila evolustadio. La homo tie devas per si mem akiri konscion en ĉiuj ses molekulspecoj de sia emocia kovrilo kaj en la du plej malaltaj de sia mensa kovrilo. Al la emocia stadio apartenas preskaŭ ĉio, kion la hodiaŭa homo alkalkulas al civilizacio kaj kulturo.

<sup>14</sup>Oni dividas la emocian stadion en la civilizacian kaj la kulturan stadiojn. Ambaŭ stadioj

prezentas multajn nivelojn.

<sup>15</sup>La emocia konscio de la civilizaciulo malofte etendiĝas preter la tri aŭ kvar plej malaltaj molekulspecoj, lia mensa konscio malofte preter la du plej malaltaj. Havante tian etan mensan kapablon, li intelektigas siajn avidojn en tiajn sentojn, kiaj plej ofte troviĝas en la pli malaltaj regionoj de la emocia mondo. Ĝenerale ili estas de repeliĝa naturo.

<sup>16</sup>En la kultura stadio aktiviĝas la tri pli altaj molekulspecoj de la emocia kovrilo. La tiurilataj vibradoj en la emocia mondo estas ĉefe altirigaj. La individuo povas, unu fojon atinginte tiujn regionojn, sin liberigi iom post iom de la tendenco, antaŭ longe akirita, de repeliĝa sintenado al la medio kaj al si mem. La sentoj plinobliĝas je ĉiu pli alta nivelo kaj anstataŭas la antaŭan impresiĝemon al la sennombraj specoj de malamaj esprimoj de la repeliĝaj vibradoj. Ĉar ĉio estas malamo, kio amo ne estas.

<sup>17</sup>En la plej altaj kulturaj niveloj la individuo fariĝas mistikulo. Li atingas regionojn de emocia konscio, kie li jam ne povas utiligi sian intelekton ĝis tiam akiritan. Ofte li spertas en ekstazaj statoj la unuecon de la vivo, kiu superas ĉian intelekton. Lia fantazio, potence disvolviĝante, perdigas lin en ŝajna senfineco. Lia emocia disvolviĝo finiĝas kaj kroniĝas per sanktula enkarniĝo. En la enkarniĝoj sekvantaj tiun li strebas fariĝi mensa mio.

<sup>18</sup>La mensa stadio dividiĝas en la humanecan kaj idealecan (aŭ kaŭzalan) stadiojn. La humaneculo aktivigas la konscion en la kvar pli malaltaj mensaj molekulspecoj, la idealeculo en ĉiuj ses. La humaneculo estas mensa mio, la idealeculo estas kaŭzala mio.

<sup>19</sup>Plej karakterizas la humaneculon lia strebado al sana prudento, necesa kondiĉo por akiri la kaŭzalan intuicion. Li jam ne povas perdiĝi en la neesprimebla, kiel la mistikulo, sed postulas antaŭ ĉio klarecon en ĉio kaj faktojn por ĉio. Lia nevenkebla volo intelekti la realon kaj kompreni la vivon, spite de ĉio, devigas lin ĉiam serĉi plue. La ĉiam pli longa restado en la mensa mondo inter la enkarniĝoj, dum kiu li povas trankvile prilabori siajn ideojn, reefikas sur ĉi tiun strebadon. Li iĝas ĉiam pli impresiĝema al la inspiroj de la pli aĝaj fratoj de la kvina naturregno. Kiam li estas atinginta la Sokratan komprenon, ke la homo povas scii nenion sciindan, tiam li estas matura por informiĝi pri la esoterika scio.

<sup>20</sup>En la malnovaj tempoj oni tiam elektis lin por iniciĝo en iun sekretan sciordenon. Nune li ricevas la scion donace en formo de mensa sistemo de la fundamentaj faktoj pri la ekzistado, kiun lia racio devigas lin akcepti kiel la solan teneblan laboran hipotezon. Per la helpo de la scio akirita ebligi al li aktivigi ĉiam pli altajn specojn de konscio, ĝis unu tagon la mondo de la intuicio malfermiĝas antaŭ li kaj li mem ekhavas la eblon konstati faktojn pri la realo kaj pri la vivo kaj studi siajn antaŭajn enkarniĝojn kiel homo.

<sup>21</sup>Tiam li komprenas, kiel senespera laboro estas por la homo la provado akiri ĉi tiun scion per siaj nesufiĉaj rimedoj, kiel preskaŭ neebla estas por la plejmulto eĉ ĝia intelektado. Ili eliras de sia kredo- aŭ pensosistemeto kaj imagas, ke per tio ili povas juĝi ĉion. Li komprenas, ke la konscivivo de la homoj, krom la konstato de faktoj en la videbla fizika mondo, konsistas el emociaj iluzioj kaj mensaj fikcioj. Li ankaŭ komprenas, kiel senutile estas sugesteti, kiel Platono, ke ekzistas iu mondo de idealoj. Nun li scias, ke ĝi ekzistas.

<sup>22</sup>Kiel kaŭzala mio li akiras scion pri la vivleĝoj kaj kapablon apliki tiun ĉi scion kun racieco kaj intensigita celkonscio. Li komprenas, ke la eraroj fare de la nesciularo rilate al tiuj ĉi leĝoj ne estas krimoj kontraŭ dio, ke ĉio bona kaj malbona, kion renkontas la homo, estas lia propra faro.

<sup>23</sup>Li ekrilatas kun tiuj en pli altaj regnoj kaj ricevas de ili tiujn faktojn, kiujn li bezonas plie sed ne povas mem konstati. Li akiras iom post iom la dek du esencialajn kvalitojn, kiuj ebligas lian transiron en la kvinan naturregon. Ili estas menciitaj en la esotera rakonto pri la dek du laboroj de Heraklo, tute distorditaj en la ekzotera legendo.

<sup>24</sup>Ĉiu el la kvin kovriloj de la homo havas sian propran konscion kaj siajn proprajn tendencojn. Tiuj de la organismo estas la heredaĵo de la gepatroj. Al tiuj kvalitoj kaj kapabloj kaj tiel plu, kiujn la mio akiras en la emocia kaj mensa kovriloj, respondas fasko da atomoj (sanskrite: skandha), estas konservataj de la kaŭzala kovrilo kaj utiligataj ĉe la reenkariniĝo.

Estas la tasko de la mio lerni regi la kovrilojn, tiel ke ili cedu al la volo de la mio. Ne estas tio facila tasko, ĉar la kovrilaj tendencoj estas rezulto de kutimoj de miloj da enkarniĝoj. La emocia regas la fizikan en la nuna ĝenerala evolustadio de la homaro. Restas la rego de la emocia per la mensa. Kaj por tio oni bezonas pli ol bonaj decidoj. Tio povas postuli multajn vivojn, post kiam oni komprenis ties necesecon.

<sup>25</sup>Kiam la individuo forlasas sian eluzitan organismon kun ĝia etera kovrilo, li pludivas en sia emocia kovrilo. Kiam tio diseriĝas, li daŭrigas en sia mensa kovrilo. Kiam ankaŭ tio diseriĝas, li atendas, dormante en sia kaŭzala kovrilo, la renaskiĝon en la fizikan mondon. La fizika mondo estas la plej grava sen komparo, ĉar en ĉi tiu mondo ĉiuj homaj kvalitoj estas akirendaj, nur en ĝi li havas la eblon sin liberigi de emociaj iluzioj kaj de mensaj fikcioj. La vivo inter enkarniĝoj estas ripoza periodo, dum kiu la homo lernas nenion novan. Ju pli frue la mio povas sin liberigi de siaj enkarniĝaj kovriloj, des pli rapide ĝi evoluas.

<sup>26</sup>Samtempe kiam, ĉe la tiel nomata proceso de morto, la etera kovrilo liberiĝas disde la organismo, la emocia kovrilo liberiĝas disde la etera kovrilo, kiu restas proksime al organismo kaj dissolviĝas kun ĝi.

<sup>27</sup>La vivo de la homo en la emocia mondo povas aperi tute malsama al la individuoj, depende de ilia evolunivelo

<sup>28</sup>La emocia mondo, same kiel la fizika mondo, havas ses ĉiam pli altajn regionojn. Nuntempe la plejmulto da homoj dekomence objekte konscias en la tri regionoj respondaj al la tri pli malaltaj de la fizika mondo. (Kontraŭe la mensa konscio ankoraŭ restas subjektiva.) La objektoj en tiuj regionoj estas materiaj respondejoj al la materiaj formoj de la fizika mondo, kaj tial la ĵusveninto ofte kredas, ke li vivas ankoraŭ en la fizika mondo. La individuo ankaŭ povas dum la unua periodo kunesti kun siaj amikoj en la fizika mondo, kiam ili dormas. Ne posedante esoterikan scion, li kredas, kiel ĉiuj aliaj, ke la plej alta regiono de ĉi tiu lia nova mondo estas "la ĉielo kaj lia fina celo en la eterneco".

<sup>29</sup>La emocia kovrilo dissolviĝas iom post iom: unue ĝia plej malalta molekulspeco, post tiu la tuj pli alta kaj tiel plu. Post kiam la tri pli malaltaj diseriĝis, la individuo ne havas eblon kontakti la videblan fizikan mondon. Ekzistas tiuj, kiuj jam dum la proceso de fizika morto povas sin liberigi de la tri pli malaltaj molekulspecoj de sia emocia kovrilo.

<sup>30</sup>En la tri pli altaj regionoj de la emocia mondo la ekzistantaj materiformoj estas fantaziaj kreaĵoj faritaj de individuoj en tiuj regionoj, ĉar la emocia materio formiĝas laŭ eĉ la plej malgranda sugesteto de la konscio, kaj la nesciuloj nek komprenas la kialon nek povas intelekti la kielon. Iom efektive novan la individuo lernas malofte en la emocia mondo kaj en la mensa mondo neniam.

<sup>31</sup>La vivdaŭro de la emocia kovrilo povas varii tiom, kiom tiu de la organismo.

<sup>32</sup>Post la dissolviĝo de la emocia kovrilo la individuo vivas en sia mensa kovrilo nepre subjektivan pensan vivon, ne suspektante la maleblon percepti iajn objektivaĵojn en tiu mondo. Sed la perceptado de realeco, beateco kaj perfekteco, ĉioscio kaj ĉiopovo estas absoluta. Ĉiuj liaj fantazioj iĝas por li absolutaj realaĵoj. Ĉio, kion li deziras, troviĝas tie sammomente kaj ĉiuj liaj amikoj, ĉiuj "granduloj" de la homaro, estas ĉe li, egale perfektaj.

<sup>33</sup>La memstara vivdaŭro de la mensa kovrilo povas varii de iu minuto (ĉe la barbaro) ĝis miloj da jaroj. Ĉio dependas de tio, kiom da ideoj amasigis la individuo dum la fizika vivo kaj ilia vivforto. Laŭ raporto Platono havas materialon por prilaboro por dek mil jaroj.

<sup>34</sup>Ĉe la dissolviĝo de la mensa kovrilo la individuo en sia kaŭzala kovrilo profundiĝas en sensonĝan dormon, kiu daŭras ĝis la tempo por renaskiĝo estas veninta kaj feti estas formita al li en fizika patrino korpo. Li vekigis kun avido je nova vivo kaj instinkte formas per la helpo de la kaŭzala kovrilo novajn mensan kaj emocian kovrilojn, la necesajn komunikilojn. Estas tasko de la kreskanta infano disvolvi la konscikapablon en ĉi tiuj helpe de la latentaj dispozicioj.

<sup>35</sup>Sen akiro de la intuicio de la kaŭzalaj ideoj en fizika vivo konscia kaŭzala vivo estas nebula. (Cetere ĉio estas akirenda en la fizika.) La konscikoninueco de la monado, ebula per la

memoraro en ĝiaj enkarniĝaj kovriloj nune disiĝintaj, perdiĝis. Kontraŭe la kaŭzala kovrilo konservas la memoraron pri ĉiuj enkarniĝoj kiel homo, kun spertoj havitaj, scio kaj kompreno, kvalitoj kaj kapabloj akiritaj. Ĉio ekzistas kiel dispozicioj en novaj enkarniĝoj. Kiom aŭ, pli ĝuste, kiomete da ĉio estas denove efektivigita, dependas de la novaj okazoj de la individuo por rememorado kaj disvolvado de la kvalitoj latentaj.

### 1.35 La kvina naturregno

<sup>1</sup>Nur la individuoj atingintaj la plej altan kosman mondon havas absolutan (100-procentan) scion pri la tuta kosmo kaj pri la tri aspektoj (la materia, la movado kaj la konscio).

<sup>2</sup>Same kiel la homoj devas ricevi scion pri mondoj pli altaj de individuoj en la kvina naturregno, tiel ĉi tiuj siavice devas ricevi scion pri ankoraŭ pli altaj mondoj kaj pri la ekzistado en ĝia tuteco de individuoj en la sesa naturregno kaj tiel plu tra la tuta serio da ĉiam pli altaj regnoj. Ĉiuj tamen ricevas nur tiun scion, kiun ili bezonas por kompreni la realon, por pluevoluadi, kiun ili ne mem povas akiri. Ĉiuj individuoj en pli altaj regnoj estas esploristoj en siaj mondoj kaj devas akiri propran scion pri ĉio en tiuj monoj kaj lerni senfrote apliki la scion pri tiuj leĝoj de la naturo kaj de la vivo, kiuj estas konstantaj en iliaj mondoj.

<sup>3</sup>Per la esencialiĝo la kaŭzala mio akiras kovrilon de esenciala materio kaj per tio transiras de la kvara al la kvina naturregno.

<sup>4</sup>La kvina naturregno konsistas kiel el 46-mioj (esencialaj mioj), havantaj kovrilon kaj konscion en la planeda esenciala mondo, tiel ankaŭ el 45-mioj, havantaj kovrilon kaj konscion en la sunsistema superesenciala mondo.

<sup>5</sup>La konscio de la esenciala kovrilo estas konscio de unueco. La individuo konscias, ke li estas sia propra mio, havanta neperdeblan memidentecon, sed krome pli vasta mio kune kun ĉiuj monadoj en la kvin naturregnoj, spertas, kiam li tion deziras, la konscion de aliaj kiel propran konscion. "La guta konscio estas unuiĝinta kun la oceana konscio." La "unuiĝo kun dio" estas la akiro fare de la mio de la unueca konscio.

<sup>6</sup>En la atomoj de ĉiuj pli maltaltaj mondoj (47–49) troviĝas esencialaj atomoj kun pasiva konscio, kiuj povas aktiviĝi de vibradoj de ekstere (dio imanenta). Nur en la pli alta emocia stadio la individuo estas sufiĉe evoluinta por kapabli percepti tiujn vibradojn eĉ iufoje.

<sup>7</sup>En la sekreta sciordeno de la gnostikanoj la 46-konscion oni nomis la filo aŭ "Ĥristos" kaj la 43-konscion la "patro" aŭ la "granda ĉarpentisto".

<sup>8</sup>La 46-mio estas ĉioscia en la mondoj 46–49. Ĉioscio signifas, ne ke la individuo scias ĉion pri ĉio, sed ke li povas, en okazo de bezono, rapide ekscii ĉion, kion li deziras scii en siaj mondoj, nedepende de spaco kaj tempo pasinta.

<sup>9</sup>Nur la esenciala konscio povas konscii en la fizikaj, emociaj kaj mensaj atomoj. Ĝis tio la subatoma molekula konscio estis la plej alta speco de konscio en la diversaj mondoj. Post la akiro de tiuj specoj de atomkonscio la monado povas identigi sin kun la totala konscio de tiuj mondoj kaj iliaj malfalsaj memoraroj pri tempo pasinta.

<sup>10</sup>Kiel esenciala mio la individuo devas per propra esplorado mem akiri kompletan scion pri ĉio esenca en la homaj mondoj (47–49).

<sup>11</sup>La esencialaj monadoj formas propran kolektivajn vivaĵon, kiu havas komunan totalan konscion.

<sup>12</sup>La esenciala mio ne devas plu enkarniĝi, ĉar ĝi ne havas ion pli por lerni en la regno de la homo. Tamen ĝi ofte enkarniĝas por helpi, en ĉiu maniero kaj per kontakto persona, al tiuj, kiuj sin preparas por eniri en pli altan regnon. Anstataŭ danko ili devas kalkuli kun tio, ke ilin oni miskomprenos, kalumnios kaj persekutos, precipe tiuj, kiuj laŭ la ordinara malmodesta tromemfido kredas, ke ili estas pretaj, malsukcesante ĉe la provoj, kiujn ili trapasas eĉ ne suspektante tion.

<sup>13</sup>Kiam la homaro estos kompreninta sian preskaŭ totalan nescion pri la vivo kaj sian nekapablon solvi la problemojn kaj gvidi la evoluadon, tiam eĉ 45-mioj kaj ankoraŭ pli altaj avataroj estos pretaj enkarniĝi, se ilia helpo estos alvokata de almenaŭ konsiderinda procentaĵo

de la homaro. Antaŭ tiam tio estus sensenca sinofero.

<sup>14</sup>La tasko de la esencuala mio koncerne al ĝi mem estas ne sole relernado en ĉiuj rilatoj sed ankaŭ iom-post-ioma akirado de konscio en la ses molekulspecoj de sia kovrilo, ĉe tio anstataŭiganta pli malaltan per pli alta, ĝis la kovrilo konsistas senescepte el esencuala atom-materio. Kiam tio estas plenumita, la individuo komencas respondan proceson de aktiveco kaj konscio en la 45-mond, por fariĝi 45-mio.

<sup>15</sup>La superesencuala mio konstante denove spertadas, ke ne nur efektive sed ankaŭ simbole la lumo de pli malaltaj mondoj estas mallumo de pli altaj. 45-mio rilatas laŭkonscie al homo kiel homo al vegetaĵo.

<sup>16</sup>En certa esoterika literaturo oni nomas esencualecon "amo kaj saĝo", superesencualecon "volo". Tiaspecaj terminoj estas, por diri plej malmulte, erarigaj. La nekapablo trovi novajn terminojn estas mirinda, ja kiam eĉ la plej bagatela teknika novaĵo ricevas sian propran.

<sup>17</sup>Uzi la vorton "amo" por esencualeco kaj samtempe diri, ke la homo ne scias, kio estas amo, klarigas nenion. Sed la konfuziĝo de ideoj tiom pliiĝas, ke la homoj tuj estas pretaj aserti, ke la homo ne povas ami. La homa amo estas altiriĝo (fizika, emocia kaj mensa). Bedaŭrinde ĝi povas, se ĝi ne estas sincera, ŝanĝiĝi en repeliĝon. Por esencuala konscio ekzistas nek altiriĝo nek repeliĝo, sed nur nedividebla unueco kun ĉio, volo al unueco.

<sup>18</sup>La nomo "volo" por superesencualeco estas egale maltrafa. Maksimume "volo" povas esti uzata nur en la malnova filozofia senco: la rilato de la konscio al celobjekto. Tion tamen oni vere povas nomi malabunda informo.

<sup>19</sup>46-konscion oni konvene nomas monda konscio

45-konscion planeda konscio

44-konscion interplaneda konscio

43-konscion sunsistema konscio.

<sup>20</sup>La esencuala mio scias la neŝanĝeblon kaj neeviteblan juston de la Leĝo, la diecon de la vivo kaj la nedetruieblon de ĉiuj monadoj. Ĝi scias, ke la vivo estas feliĉo kaj ke suferado ekzistas nur en la tri pli maltaltaj molekulspecoj de la fizika kaj emocia mondoj (49:5-7, 48:5-7) kaj tiam nur kiel malbona rikolto el malbona semado.

### *1.36 La sesa naturregno aŭ unua diregno*

<sup>1</sup>Al la plej malalta diregno oni alkalkulas tiujn individuojn, kiuj estas akirintaj kovrilojn kaj konscion en la du plej altaj sunsistemaj mondoj (43 kaj 44). Je ilia dispono estas la du plej altaj kolektivaj konscioj de la sunsistemo. Ili estas ĉiosciaj interne de la sunsistemo, sendepende de la spaco en tiu globo kaj ĝia tempo pasinta. Ke ili plene primajstras la materiaspekton kaj movadaspekton kaj la Leĝon interne de la mondoj 43–49, oni sendube komprenas.

### *1.37 Kosmaj regnoj*

<sup>1</sup>Pri la ses ĉiam pli altaj diregnoj en la 42 pli altaj atomaj mondoj ni scias, ke ili ekzistas, ke ili prezentas perfektan kosman organizaĵon, kiu efikas kun senerara precizeco laŭ ĉiuj naturleĝoj kaj vivleĝoj de la ekzistado.

<sup>2</sup>En la kosmo la individuo ne akiras proprajn kovrilojn. Li transprenas iun altan funkcion kaj fine la plej altan funkcion en sia mondo kun ĝia kolektiva konscio kaj identigas sin kun tiu mondo kiel propra kovrilo.

<sup>3</sup>La individuoj en la dua diregno strebas al ĉioscio en la mondoj 36–42 (nur tie "kosma konscio"), en la tria diregno al ĉioscio en la mondoj 29–35 kaj tiel plu.

<sup>4</sup>Kiuj jam atingis la plej altan mondon, tiuj estas liberigintaj sin de ĉia involvado en la materion kaj kiel liberaj monadoj (praatomoj) elkoni sin mem kiel la pramiojn, kiuj ili ĉiam estis. Ilia aŭro estas kiel kosma sunego, kaj ili disradias energion kvazaŭ prafonto de ĉiu forto.

<sup>5</sup>Ili povas, se tion dezirante, eliri kun kolektivo el sia kosmo kaj komenci konstrui novan kosmon en la senlima ĥaoso de la pramaterio.

### 1.38 La planeda hierarĥio

<sup>1</sup>La individuoj de la kvina kaj sesa naturreĝoj konsistigas la hierarĥion de nia planedo, akirintan atomkonscion en la planedaj mondoj 46 kaj 45, kiel ankaŭ en 44 kaj 43.

<sup>2</sup>La hierarĥio estas dividita en sep departementojn. Ĉiu departemento laboras per sia specialigita energio, funkcia laŭ la sunsistema leĝo de periodeco.

<sup>3</sup>La hierarĥio gardas super la evoluado en la pli malaltaj regnoj. Ĝin precipe interesas tiuj en la humaneca stadio, kiuj kun intensigita celkonscio penas akiri la dek du esencialajn kvalitojn por povi pli bone servi al la vivo. Per tio ili sin kvalifikas por la kvina regno.

### 1.39 La planeda registaro

<sup>1</sup>Al la planeda registaro povas aniĝi individuoj atingintaj la duan diregnon. La estro de la planeda registaro estas ano de la tria regno.

<sup>2</sup>Kiel ĉiuj registaroj en ankoraŭ pli altaj regnoj, ĝi dividiĝas en tri ĉefajn departementojn, kiuj administras la tri fundamentajn funkciojn rilatajn al la aspektoj de la materio, movado kaj konscio. Ili havas la plej altan respondecon por ke ĉiuj tiurilataj procesoj okazu kun senerara precizeco. Ili prizorgas, ke ĉiuj ricevu tion, kion ili bezonas por sia konscievoluado kaj ricevu senindulgan juston laŭ la leĝo de semado kaj rikoltado.

<sup>3</sup>En siaj interrilatoj kun homoj la dioj prenas homan idealan formon, konstantan kovrilon de fizika atommaterio, kiel ankron ankaŭ por ilia fizika konscio, kovrilon, kiun ili facile povas videbligi al ĉiuj.

### 1.40 La sunsistema registaro

<sup>1</sup>Aniĝo al la sunsistema registaro postulas, ke la individuo estu atinginta la trian diregnon. Kompreneble ĝi gardas super ĉio interne de la sunsistemo, ricevas direktivojn de pli altaj registaroj kaj donas direktivojn al la planedaj registaroj.

<sup>2</sup>Ĝi ankaŭ perigas scion ricevitan pri la kosmo kaj la Leĝo tiom, kiom tio estas necesa por la plenumado de la funkcioj.

<sup>3</sup>La leĝo de memrealigado validas en ĉiuj regnoj, kaj ĉiuj individuoj devas per siaj rimedoj esplori siajn mondojn kaj lerni apliki la scion kaj sperton akiritajn.

### 1.41 LA LEĜO

<sup>1</sup>La leĝo estas la sumo de ĉiuj leĝoj de la naturo kaj de la vivo: la konstantaj rilatoj de la materio, la movado kaj la konscio – esprimoj de la esenco de la materio kaj de la blinda maniero, en kiu la ĉiopova, neelĉerpebla, eterne dinamika praforto efikas en la neŝanĝeblaj kaj neeviteblaj konstantaj rilatoj de la naturo kaj la vivo.

<sup>2</sup>La scienco ankoraŭ ne esploris pli ol treege eta frakcio de tiu Leĝo.

<sup>3</sup>Ekzistas leĝoj en ĉio, kaj ĉio estas esprimo de leĝo. La dioj mem estas submetitaj al la Leĝo. Ĉiopovo estas ebla nur per nepre senerara aplikado de ĉiuj leĝoj.

<sup>4</sup>Ne aperas leĝoj en la pramaterio (la ĥaoso de la antikvuloj). Ili aperas nur lige kun la kunmetiĝoj de la praatomoj en la kosmo.

<sup>5</sup>Ju pli la limoj de la subjektiva kaj objektiva konscio plivastiĝas, des pli da leĝoj malkovriĝas. Nur la monadoj en la pli alta diregno posedas scion pri ĉiuj leĝoj kaj kapablas kun nepre precizeco ĝuste apliki ĉiujn leĝojn de la universo.

<sup>6</sup>Leĝoj de la naturo koncernas la materion kaj la movadon, leĝoj de la vivo la konsci-aspekton.

<sup>7</sup>La leĝoj plej gravaj por la homoj estas: la leĝo de libereco, la leĝo de unueco, la leĝo de disvolviĝado, la leĝo de memo (la leĝo de memrealigado), la leĝo de sorto, la leĝo de rikoltado kaj la leĝo de aktivigado.

<sup>8</sup>La leĝo de libereco diras, ke ĉiu monado estas sia propra libereco kaj sia propra leĝo, ke libereco estas akirata per leĝo, ke libereco estas la rajto al individua karaktero kaj aktiveco en

la limoj de ĉies egala rajto. (La scivolemo pri la psika vivo de aliaj estas grava eraro.)

<sup>9</sup>La leĝo de unueco diras, ke ĉiuj monadoj formas unuaĵon kaj ke ĉiuj monadoj devas realigisian unuecon kun ĉiu vivo por atingi superindividan ekspansigon de sia konscio.

<sup>10</sup>La leĝo de disvolviĝado diras, ke ĉiuj monadoj disvolvas sian konscion, ke ekzistas fortoj diversmaniere efikantaj direkte al la fincelo de la vivo.

<sup>11</sup>La leĝo de memo diras, ke ĉiu monado devas mem akiri ĉiujn kvalitojn kaj kapablojn necesajn por ĉioscicio kaj ĉiopovo; ekde la homa regno: kompreno de leĝoj kaj el tio sekvanta respondeco.

<sup>12</sup>La leĝo de sorto indikas tiujn fortojn, kiuj efikas sur la individuon konsidere al necesaj spertoj.

<sup>13</sup>La leĝo de rikoltado diras, ke ĉio bona kaj malbona, kion ni okazigis per pensoj, sentoj, diroj kaj agoj, revenos al ni kun la sama efiko. Ĉiu esprimo de konscio havas efikojn en multoblaj rilatoj, alportante aŭ bonan aŭ malbonan semadon, kiu iufoje maturiĝos en rikolton.

<sup>14</sup>La leĝo de aktivigado diras, ke individua disvolviĝo estas ebla nur per memvekita konsciaktiveco.

<sup>15</sup>Pli detala trakto pri la vivleĝoj estas donita en *La filozofa ŝtono* de Laurency. La leĝoj plej gravaj por la individuo estas la leĝo de libereco, la leĝo de unueco, la leĝo de memo kaj la leĝo de aktivigado, kaj precipe la du unue menciitaj.

<sup>16</sup>La vivleĝoj ebligas la plej grandan liberecon eblan por ĉiu kaj seneraran justecon al ĉiu. Libereco aŭ potenco estas la dia, neperdebla rajto de la individuo. Ĝi estas akirita per scio pri la Leĝo kaj pri la senerara aplikado de la leĝoj. Libereco (potenco) kaj leĝo antaŭkondiĉas sin reciproke. Disvolviĝo implicas laŭcele aplikatan aktivecon laŭleĝan. Alie la kosmo degenerus en haoson.

<sup>17</sup>La evoluado ĉe monadoj de repeliĝa baza tendenco povas preni malpravon direkton, montriĝante jam per parazitismo en la vegetala regno kaj rabado en la animala regno (kaj ĉe la homo). Nekonscia kaj, en ankoraŭ pli alta grado, konscia sintrudo al la eterne neperdebla, netuŝebla dia libereco de la monado, libereco limigita de la egala rajto de ĉiu vivaĵo, rezultigas la bataladon pro la ekzistado kaj la kruelon de la vivo.

<sup>18</sup>Vivo estas ĝojo, feliĉo, beato en la mensa mondo kaj en ĉiuj mondoj pli altaj. Suferado ekzistas nur en la tri pli malaltaj regionoj de la fizika kaj emocia mondoj.

<sup>19</sup>Malbono estas eraro pri la Leĝo, precipe la repeliĝa tendenco (la malamo) en ĉiuj ĝiaj senombraj formoj.

<sup>20</sup>Ĉio bona kaj malbona, kio trafas la individuon, estas lia propra faro, la rezulto de lia propra apliko de lia limigita konceptado pri pravo kaj malpravo. Ĉiuj devas rikolti tion, kion li semis en antaŭaj vivoj kaj ofte en la sama vivo. La individuon ne povas trafi io, kion li ne jam meritis per spitado al la Leĝo.

<sup>21</sup>”La homa duobla naturo” aperas en la konflikto inter ”la supra mio kaj la malsupra”, inter la neeviteblaj kaŭzalaj idealoj de la kaŭzala konscio, kiujn la individuo povas realigi pli aŭ malpli frue, kaj la ”neperfekta personeco” en la enkarniĝaj kovriroj (la kvalitoj, kiujn akiris la mio en la pli malaltaj stadioj). Apartenas al la kompleta spertado de la vivo, ke la mio iam havis ĉiun el la malbonaj kvalitoj kaj rikoltis la sekvojn.

<sup>22</sup>La homo lernas, eĉ se nekredeble malrapide, per propraj spertoj kaj per rikoltado de tio, kion li semis. La homo enkarniĝadas ĝis li estas lerninta ĉion, kion li devas lerni, kaj rikoltinta ĝis la lasta grajno ĉion, kion li semis. Ju pli altan evolustadon estas atinginta iu vivaĵo, des pli grandan efikon havas ties eraroj pri la Leĝo kaj des pli grandan efikon la malrespekto, al kiu tiu vivaĵo estas elmetita. Nejusteco en iu ajn rilato estas nepre senekzista, kaj la parolo pri tio estas parolmaniero de nesciuloj kaj enviuloj.

<sup>23</sup>Nescio, senleĝeco, suverena arbitro sekvas sin reciproke. Laŭmezure kiel la homo atingas ĉiam pli altajn nivelojn, li komprenas la necesecon kaj laŭcelecon de leĝo, penas havigi al si scion pri natur- kaj vivleĝoj, kaj strebas por akiri la kapablon racie aplikati tion, kion li scias. Kiam la homo povos fari tion, li estos ne nur klera sed ankaŭ saĝa.

<sup>24</sup>La nesciulo kredas, ke li povas resti senleĝa, rifuzi akiri scion pri natur- kaj vivleĝoj kaj prave apliki ilin. La naturleĝo pri kaŭzo kaj efiko, la vivleĝo pri semado kaj rikoltado iom post iom instruas tion, kio estas necesa, al la homo nescianta kaj plej spitanta al la vivo per sennombraj suferigaj spertoj. Estas necese, ke la nesciulo informiĝu pri la neevitebleco de leĝo kaj ke la nevolanto lernu ne perforti la egalan rajton de ĉiuj.

<sup>25</sup>Ĉiuj moralistoj (la Fariseoj de la evangelio) malrespektas la leĝojn de libereco kaj unueco per siaj ĉiamaj malrespektaĵoj de la persona netuŝendeco de la individuo (sia klaĉemo, siaj kuratoraĉaj manieroj, siaj entrudiĝoj en la sanktecon de la privata vivo). La individuo havas la dian rajton de la vivo esti ĝuste tia, kia li estas kun ĉiuj siaj mankoj, difektoj kaj malvirtoj; pensi, senti, paroli kaj agi laŭ sia bontrovo tiel longe, kiel li ne per tio malrespektas la egalan rajton de aliaj pri la sama netuŝenda libereco.

<sup>26</sup>En la nuna evolustadio de la homaro forestas kompreno de la rajto de la individuo pri nepra netuŝendeco. La vivmaniero de aliaj ne estas nia afero, kaj ĉiuj verdiktoj estas gravaj eraroj. Ĉi tion devas kompreni almenaŭ la tiel nomitaj esoterikistoj; sed ŝajnas, ke estas tro frue por ke ili lernu ne enmiksiĝi en la aferojn de aliaj. Ĉi tio apartenas al la arto de silentado.

<sup>27</sup>Homaj juraj kaj sociaj sistemoj senĉese aliĝos, ĝis la fine ellaborita leĝa sistemo akordos kun la leĝoj de la vivo, la evoluado kaj celo de la vivo.

#### *1.42 La scienco de la estonteco*

<sup>1</sup>La hilozoiko, la mensa scisistemo ellaborita de 46-mio Pitagoro, estas la sola esoterika sistemo traktanta la triunuon de ekzistado kaj per tio donanta la bazan rigardmanieron de la planeda hierarĥio pri la ekzistado. Al Pitagoro ni ŝuldas dankon pro tiuj konceptoj de realo, kiuj konsistigas la necesan bazon de scienca rigardmaniero. Estis ja la intenco de Pitagoro meti per la spirita materiismo la neskueblan fundamenton de la scienco de la estonteco.

<sup>2</sup>El la tri aspektoj de la ekzistado la materiaspekto estas la sola ebliganta sciencan ekzaktecon. Nek la konsciaspekto nek la movadaspekto povas liveri egale logikajn klarigajn bazojn. Kaj la joga filozofio kaj la malnovaj kaj novaj "okultaj" sistemoj estas la plej bonaj pruvoj de tio.

<sup>3</sup>La plejmulto da sistemoj de "superfiziko" vidintaj la taglumon en nia tempo plej bone konvenas al emociuloj, kiuj ne bezonas klarecon, eĉ ne deziras ĝin, ĉar klareco estas malhelpo al la mistikula bezono senbride ekspansiigi la fantazion en la senfino.

<sup>4</sup>Estas evidente, ke la intelektularo edukita en filozofio kaj scienco ne oferos tempon kaj penon al sistemoj tiel neklaraj, precipe kiam ĉiuj aŭtoritatuloj religiaj, filozofiaj kaj sciencaj jam deklaris la esoterikon la spirita miksaĵaĉo de mistagogoj, kion scias ĉiuj jam de longe.

<sup>5</sup>Kiu asimilis la enhavon de "La problemoj de la realo", tiu poste ne havos malfacilaĵojn malkovri la mensajn mankojn de la antaŭaj sistemoj. Tamen tian komparadon la needukita en la esoteriko prefere prokrastu ĝis li funde ellernos la esoterikon, ĉar aliokaze konfuziĝo de ideoj facile sekvas. Ĝuste por eviti tian en malnovaj tempoj estis al neniu permesate aliĝi al du sciordenoj.

<sup>6</sup>La ĉapitroj 1.4–1.41 konsistigas la "malgrandan katekismion" de la hilozoikisto.

#### *1.43 Finaj vortoj*

<sup>1</sup>La emocia tasko de la religio estis liberigi la homon de timo kaj maltrankvilo, doni al li fidon je la vivo kaj je la potenco de la bono, kaj tiu de la mistiko en ĉiuj religioj doni daŭran beaton kaj "la pacon, kiu superas ĉian intelekton".

<sup>2</sup>La tasko de la scienco estas esplori la fizikan sed ne la superfizikan realon. Ne havante la faktojn de la esoteriko, la homaro restos nescia pri 46 el la 49 kosmaj mondoj, la scienco povos esplori nur la 49-an.

<sup>3</sup>La filozofio, la esoteriko kaj la antropozofio pritraktis la problemojn de la ekzistado. La grava diferenco inter filozofoj kaj esoterikistoj estas, ke ĝenerale la filozofoj estis subjektivistoj, fidantaj la ĝustecon de siaj spekulativoj, dum la esoterikistoj estis objektivistoj,

konstruitaj siajn sistemojn surbaze de faktoj.

<sup>4</sup>En tiu rilato antropozofo Steiner estis esoterikisto. La diferenco inter Steiner kaj la esoterikistoj estis, ke la esoterikistoj akceptis faktojn superhomajn nur de la planeda hierarĥio, dum Steiner kredis, ke li mem kapablas konstati eĉ tiajn, evidenta absurdaĵo. Nek ili troviĝas en la "akaŝa kroniko".

<sup>5</sup>Al la teozofoj oni povas kontraŭdiri, ke mankis al ili la necesa filozofia kaj scienca edukado kaj ke iliaj prezentoj de la esoteriko estis plej ofte neinteligentaj kaj ĉiuokaze nesufiĉaj, kaj tial ŝajnintaj kvazaŭaj. Nek klarigis la teozofoj la esencan kaj principan diferencon inter la jog-filozofio kaj la esoteriko. Nek estas ĝusta tio, kion asertis Blavatsky, ke ĉia superfizika scio devenis el "Hindio". Ĝi devenis el la planeda hierarĥio, kaj ties esoterikaj sciordenoj ekzistadis en ĉiuj nacioj antingintaj sufiĉe altan nivelon por ke ili racie demandu pri la senco kaj celo de la vivo.

<sup>6</sup>La esoterikisto definitive forlasis la mondon de la iluzioj kaj fikcioj, en kiu la homaro preferas vivi, por eniri en la mondon de la realo.

La supra teksto estas la unua parto el tute sep de *La scio pri la realo*, libro verkita de Henry T. Laurency. Tradukis el la sveda Lars Adelskog en 1980. Kopirajto © Eldona fondaĵo Henry T. Laurency 1980 kaj 2017. Titolo de la sveda originalo: *Kunskapen om verkligheten*.